



3*87.120.

STARTO

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

5. SJEZD ĈES OLOMOUC



11.-13. 9. 1987



Pacalvoko el PARDUBICE

Omage de la 45a datreveno de ekstermo de vilaĝo Ležáky kunvenis esperantistoj el naŭ landoj je la VIIIa Pacrenkontiĝo en Pardubice.

Ili konstatis, ke kvankam ĉiujare plifortiĝis kontraŭstaro de plimulto de enloĝantoj sur nia planedo kontraŭ la militarismigo de la kosmo, danĝero de la nuklea holokaŭsto daŭre minacas la ekziston de la tuta homaro.

La danĝero senĉese kreskas pro evoluo de pli kaj pli ingeniaj armiloj.

La partoprenantoj de la renkontiĝo tial plene interkonsentas, ke ankaŭ en politikajn kaj internaciajn rilatojn oni devus enkonduki novan pensmanieron. Per traktado oni solvu la miskomprenojn inter la ŝtatoj, oni respektu la rajton de la homaro je vivo en paco, oni certigu ĝian daŭran materian kaj kulturen disvolvigon.

La partoprenantoj de la renkontiĝo alvokas esperantistojn el ĉiuj kontinentoj, ke ili eluzu la lingvon Esperanto por aktivigi la pacamajn fortojn en la tuta mondo por kunagadi kontraŭ la militarismigo de la kosmo kaj por sinsekva likvido de la nukleaj kaj aliaj armiloj de amasdetruo.

Kuntekste kun tiuj deziresprimoj la partoprenantoj bonvenigas la lastajn sovetiajn iniciatojn je forigo de eŭroraketoj, por reduktado de la nombro de ĉiuj raketoj je la sama nivelo, por ekvilibro ambaŭflanke. Por haltigi la armadkonkuradon la mondo bezonas internacian meratorion pri kompleta ĉesigo de nukleaj eksplodprovej.

La partoprenantoj de la renkontiĝo alvokas esperantistojn el ĉiuj landoj, ke ili ankaŭ dum la 72-a UK en Varsovio aktive ekstaru kontraŭ la militarismigo de la kosmo.

Subskribitaj la partoprenantoj de la VIIIa renkontiĝo en Pardubice, la 21an de marto 1987.

POR LA JUBILEA FONDUSO

- J. Rytichová, Teplice
L. Větrová, Olomouc
S. Majer, Troubelice
I. Šolcová, Martinice
N. Michálková, Opava
M. Školníková, Lány
M. Reichmanová, Hovorany
P. Stěpánek, Podbořany
M. Slavík, Osek
V. Kasal, Plzeň
M. Nettwalová, Ostrov n/Ohří
H. Vencovská, Česká Lípa
J. Rybář, Železnice
V. Severa, Praha 2
M. Haluzová, Brno
G. Sochová, Kopřivnice
K. Taflířová, Grešlové Mýto
S. Weisserová, Bělý
A. Dvořák, Rýžoviště
Doc. Dr. S. Špryncová, CSc.,
Olomouc
K. Fiala, Žizníkov
V. Paloc, Havířov
P. Kohoutová, Nový Bydžov
L. Chaloupková, Světice
B. Hlaváčová, Brno
Ing. J. Krob, Kladno
V. Chalabalová, Plzeň
H. Salfická, Holice v Čechách
L. Dvořák, Praha 1
J. Danová, Brno
MS Frýdek-Místek
Ing. L. Beneš, Ml. Boleslav
G. Voda, Třebíč
M. Šteflová, Praha 10
J. Drlíková, Beroun
M. Nezval, Brno
M. Červenka, Břežolupy
M. Koráb, Vsetín
J. Ruml, Praha 10
M. Uhlíková, Brandýs n/Labem
L. Czafík, Trinec n/S.
A. Stěpánek, Poděbrady
L. Breicha, Liberec
M. Kutálková, Chomutov
G. Heczko, Zábřeh
Z. Pally, Olomouc
M. Oplerová, Ostrava
S. Vrána, Rašovice
J. Dubinová, Nymburk
J. Kašpárek, Nížkov
Z. Dušková, Písek
Ing. J. Blažková, Praha 4
M. Pánková, Český Těšín
J. Doležalová, Ždár n/Sáz.
J. Toufar, Brno
J. Bruthans, Vrdy
J. Bruthansová, Vrdy
Dr. J. Bina, Brno
F. Sokorka, Třebíč
V. Onesorková, Litomyšl
Ing. M. Pališín, Písek
A. Franc, Sedlonov
K. Bartošová, Svitavy
I. Mičunková, Rožnov p. R.
L. Janů, Světlá n/Sáz.
Ing. J. Žáček, Stodůlky
N. Břízová, Usobí
F. Janouš, Rumburk
A. Tolevová, Orlová Rtyné
Dr. Muzikář, Perník
J. Vančura, Praha 2
O. Háková, Dolní Radomí
V. Kohlertová, Nové Město
Ing. M. Blažek, Brno
J. Halama, Varnsdorf
K. Stanková, Pardubice
Ing. M. Petrák, Olomouc
S. Kapišinská, Svitavy
T. Bozkovec, Brno
sekce invalidů
V. Stibůrek, Benešov
J. Voják, Dřívý
M. Ondráková, Brno
Z. Kadlec, Tři Sekery
Z. Jonáš, Ml. Boleslav
M. Skařupová, Ostrava-Poruba
E. Hoffmannová, Praha 6
Ing. F. Sedlár, Lipov
F. Štoviček, Hradec Králové
M. Juřenová, Újezd n. Lesy
M. Matoušová, Studánka
L. Komzáková, Tábor
MUDr. V. Tobiášová, Chotěboř
Ing. I. Riegrová, Hornopolní
J. Szmek, Frýdek-Místek



En la jaro 1985 UEA starigis Premion Zamenhof por distingi elstarajn personecojn, kiuj laŭ la opinio de la tutmonda esperantistaro aparte kontribuis al la monda paco kaj internacia komprenigo. Pasintjare, la 16-an de decembro, oni transdonis la premion al S-ro Amadou Mahtar M'Bow, la ĝenerala direktoro de Unesko.

S-ro M'Bow akceptis Premion Zamenhof per jena parolado:

"Sinjoro Prezidanto, kara Profesoro, ĝesinjoroj:

Antaŭ nelonge mi legis historian verkon, kiu okupigas pri la 19-a jarcento. Unu fakto frapis min tiam, fakto kiu estis en tiu epoko memevidenta, sed kiu hodiaŭ saĝnas al ni apenaŭ kredebla: letero sendita de Londono al Delhio povis bezoni ses monatojn por atingi sian ricevanton, kaj ĝia sendinto devis atendi unu jaron por ricevi eventualan respondon. Hodiaŭ tia letero farus la saman vojaĝon en du aŭ tri tagoj, telegramo en unu aŭ du horoj, telekso alvenus tuj. La tuta tero estas nun plektita en ciam pli densa reto de kontaktoj kaj informintersaĝoj, pere de kiuj kreskanta nombro da personoj sin trovas ligitaj al la mondo en ĝia tuteco, kaj ĉiutage spertas ĝian senliman diversecon.

Estas la ekesto de tia evoluo kiu sendube instigis antaŭ cent jaroj d-ron Zamenhof koncepti unikan komunikilon, lingvon neutralan, apartenantan nek al la propra nek al ajna nacio, kapablan ekde tiam funkcii kiel komuna komunikilo por ĉiuj nacioj... Atestanto de senfinaj kvereloj rezultantaj el la miskomprenoj, kiuj regis inter la malsamaj religiaj kaj lingvaj komunumoj, d-ro Zamenhof tiam iniciatis Esperanton, kiel komunan malfermilon kaj komprenilon, perilon de interpopola proksimigo kaj finfine - kiel ĝia nomo sugestas - de espero, de fido je mondo de universala frateco.

Kiel emfazis la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, pri kiu vi ĵus parolis, sinjoro Prezidanto, Esperanto nun definitive prezentigas kiel unu el la plej efikaj iloj de internacia interkomprenigo, favoranta komunajn interrilatojn en ĉiuj sferoj de kulturo kaj scienco. Fine, la vivanteco de Esperanto manifestigas ankau en tio, ke la Esperanto-movado estas movado de profunde humanisma inspiro. Ĝi estas movado kiu frontas ankau pli vastajn demandojn, kiuj preteriras la nuran zorgon diskonigi la lingvon. Tiel, kunveno de fakuloj organizita pasintjare en la ĉefsidejo de Unesko fare de UEA, traktis temojn kiel: "Ĉu oni povas akcepti la modelon: unu lando, unu nacio, unu lingvo?"; "Kia estas la estonteco de minoritataj lingvoj?"; "Kion fari pri la lingvoj kiuj heredigis la kolonia sistemo?".

Do Esperanto lokis sin ĉe la kerno de plej vivanta kaj aktuala problemaro, tiu de la vojoj kaj metodoj por proksimigi la popolojn kaj kulturojn de la mondo per helplingvo kun universala celo, kiu ekzistas kune kun ĉiuj naciaj kaj regionaj lingvoj sen minaci iujn ajn; sed mi aldonu ankau, ke tiu ĉi lingvistika aspekto integriĝas en multe pli vastan humanisman vizion, kaj sendube, apartigita de tiu humanisma vizio, la teknika aspekto de la lingvo ne permesus vere kompreni, kio estas la Esperanto-movado.

Jen kial, sinjoro Prezidanto, mi deziras ke Esperanto, kiun jam alprenis centoj da miloj da homoj en la tuta mondo, same kiel multnombraj universitatoj, estu ankoraŭ pli vaste uzata en la estonteco, kaj ke la esperantista komunumo, kune kun ĉiuj esperoj, kiujn ĝi portas en si, daŭre plivastigu en ĉiuj landoj.

Ĝi tiu premio estas sendube multe pli grava por mi ol multaj premioj, kiujn mi jam ricevis. Kiam mi unuafoje ceestis la kongreson de via asocio en Rejkjaviko, mi estis profunde emociita pro la sentemo de la membroj rilate la plej premaj problemojn de nia epoko, pro ilia preteco kontribui pli vastskale, sendube, ol povis d-ro Zamenhof, al la proksimigo de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj de la mondo. Ankau vi, sinjoro Prezidanto, ne auskultas tiujn por kiuj ĉiu humanisma projekto fariĝas projekto utopia. Ĉar la utopio, kiu inspiris d-ron Zamenhof, efektiviĝis kaj efektiviĝas.

Jen kial mi havas la plaĵ altan respekton por ĉiuj, kiuj partoprenas en la Esperanto-movado, kaj mi ĉiam ĝojas povi interŝangi opiniojn kun ili, ĉar mi scias, ke ni dividas ion profundan: nian kredon je la homo, kiu ajn estas la koloro de lia haŭto, kiu ajn estas lia religio, kiu ajn estas la filozofio kiun li havas kaj, egale, kiu ajn estas la lando kie li loĝas.

Tial, sinjoro Prezidanto, je mia propra nomo same kiel je la nomo de Unesko, al kiu ĉi tiu honoro iras pere de mia persono, mi petas vin kredi ke, en ĉi tiu Jubilea Jaro de Esperanto, mi plene estimas la valoron de la premio kiun vi ĵus transdonis al mi kaj mi tre profunde vin dankas pro ĝi. Dankon al ĉiuj." Amadou Mahtar M'Bow (Esperanto 1/1987)

KIAL SAT NE KONGRESOS EN POLLANDO EN 1987?

La Plenum-Komitato de SAT dissendis al la E-gazetaro leteron, datitan 1986/03/26, laŭ kiu oni povas konkludi, ke SAT estas mirigita, ke "PEA ne plu subtenas" la projekton de SAT-kongreso en Pollando en 1987.

Ni rememorigu la faktojn. En 1983 okaze de SAT-kongreso en Linz - Pola Esperanto-Asocio prezentis al SAT la inviton kongresi en Pollando konforme al plejeble bonaj intencoj, ĉar en la Jubilea Jaro oni volis kongresigi en Pollando ĉiujn sincerajn amikojn de la patrujo de Esperanto.

Pasis jaroj, dum kiuj flanke de SAT-gvidantaro venis al PEA eĉ ne plaĵ eta signo de interesiĝo pri la kongresado en Pollando en 1987. Tio ĉi jam povus esti sufiĉa kialo por veni al la konvinko, ke la inviton oni faris tro frue kaj ŝen konsidero al la veraj emoj kaj interesiĝoj de SAT-gvidantaro. Dume en la organo de SAT "Sennaciulo" pli kaj pli ofte komencis aperi artikoloj misprezentantaj kaj misfamigantaj Pollandon kaj aliajn socialismajn landojn. Cetere tiuj misprezentoj sekvis ne nur en "Sennaciulo", sed ankaŭ en aliaj SAT-eldonaĵoj frontloke kun "Sennacieca Revuo". Misprezentoj, glorigado de kontrausocialismaj, opoziciaj tendencoj, evidenta enmiksigaĵo en la internajn aferojn de Pollando, dubindigado de aliancoj de Pollando kun aliaj socialismaj ŝtatoj - jen mallonge dirite la linio de SAT speguliganta en Esperanto-revuoj de tiu organizo.

Ni rememorigu, ke apenaŭ kelkajn monatojn post la invito de SAT-kongreso al Pollando en "Sennaciulo" oni aperigis kontraŭpollandan artikolon "Ĉu la aglo tute cedos?" (decembro 1983), per kiu oni pri-

mokis la strebado de poloj al la paca-voja rearango de la situacio en la propra hejmlando.

Jen la "amika" dankesprimado de SAT pro la invito kongresi en Pollando! Alia ekzemplo de la starpunkto de SAT estis la artikolo "Pri konferenco de Jalto - 40 jaroj", tiom signifoplenaj por la evoluo de la postmilita paca situacio en Eŭropo. Strange, ke SAT oficiale deklaras sin por paco, sed ne volas rekoni la rolon de la decidoj de Jalto kaj Potsdamo por la firmigo de tiu paco!

Estas klare, ke ne la estraro de PEA, sed SAT mem per siaj unusignifaj paŝoj fermis al si la vojon al Varsovio en la Jubilea Jaro! Tia estas la vero kaj certe bone konscias tion la Plenum-komitato de SAT. Oni ne provu respondeciĝi pri tio polojn, kiuj ĉiam estis kaj estas gastamaj, sed neniam konsentos akcepti en sia lando dubindajn gastojn. Estas bedaŭrinda afero, ke la gvidantaro de SAT ne eltiris gustajn konkludojn el sia historio, ne lernis el la amaraj spertoj de la pasinteco. Domage, ĉar en SAT estas ja ankaŭ valoraj iniciatoj kaj multaj respektindaj agantoj. Restas esperi, ke prudento kaj realecosento denove superregos en SAT kaj tiam venos la tempo, ke SAT ne nur povos kongresi en socialisma lando, sed eble eĉ disvolvi legalan agadon.

GVIDANTARO
DE POLA ESPERANTO-ASOCIO

(laŭ der esperantist
n-ro 5/1986)

ESPERANTO-MOVADO EN LA NUNA ĈINIO

Tuj antaŭ la 71-a UK, por koni la progreson de la ĉina Esp-movado en la lastaj jaroj, la redakcio de El Popola Ĉinio faris enketon pri la lokaj Esp-organizaĵoj de Ĉinio. La enketo montris, ke ekde 1979 la ĉina Esp-movado vigle disvolvigis kaj malfermis novan paĝon en sia historio.

Nun ekzistas la landaj Esperantaj organizaĵoj la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la societo Amikoj de Esperanto. Escepte de Tibeto kaj Guĵou-provincio, la ceteraj 27 provincoj, autonomaj regionoj kaj municipoj jam havas sian provincaivelan Esperantan asocion (aŭ ligan). La plejparto de la provincaj ĉefurboj kaj gravaj urboj de Ĉinio havas siajn Esperantajn societojn. Ĝis la fino de aŭgusto 1986 estis sume 80 tiaj organizaĵoj. Krome, fondiĝis ankaŭ 25 guberniaj Esperantaj societoj.

En Ĉinio multaj junuloj lernas Esperanton. Aperis en 9 urboj societoj de junaj esperantistoj. Veterana esperantista asocio fondiĝis antaŭ nelonge en Pekino. Krome estas 13 fakaj Esperantaj organizaĵoj, kiaj medicina, fervoja, trafika k.a. Ĉio tio montras, ke la ĉina Esp-movado nun profundigas en la socio.

De 1979, 57 institutoj kaj universitatoj funkcias Esperanto-kurson. Inter ili estas enlande famaj altlernejoj, kiel la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, Centra-Ĉinia Instruista Universitato, Pekina Fremdlingva Instituto, Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Ĝĵinan-universitato, Ŝĵamena Universitato, Fudan-universitato, Siĉuana Universitato, Ŭhano Universitato, Ĉina Scienc-teknika Universitato k.a. Laŭ statistiko 5 000 studentoj lernis kaj lernas nian lingvon.

En la tuta lando funkcias 33 Esperantaj korespondaj lernejoj aŭ kursoj kun 400 000 homfojoj.

En Ĉinio estas pli ol 20 Esperantaj aŭ ĉina-Esperantaj gazetoj (tipografie presitaj), el kiuj estas "La Mondo", "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", "Amikoj de Esperanto", "Voĉo de Esperanto", "Lernado de Esperanto", "Esperantisto", "La Espero" k.a. Lokaj Esperantaj organizaĵoj eldonas pli ol 200 organojn kun riĉa enhavo (mimeografe).

Estas unu provinca kaj ses urbaj radiostacioj kiuj funkcias Esperanto-kurson. Ankaŭ la Ĉinghaja Televidstacio havas sian E-kurson.

En la lastaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis ĉ. 70 titolojn de libroj kun eldonkvanto de 700 000 ekzempleroj. Lokaj eldonejoj, Esperantaj asocioj kaj Esperantaj korespondaj lernejoj eldonis ĉ. 120 titolojn de libroj kun eldonkvanto de 3 000 000 ekzempleroj. Ĉio tio estas senprecedenca en la historio de la ĉina Esp-movado.

Hou Ĝiping

(el popola ĉinio, n-ro 12/1986)

72-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO okazos en Varsovio (Pollando) ekde la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 sub alta protektado de la prezidanto de la pola parlamento s-ro Roman Malinowski.

En la 72-a Universala Kongreso kulminos la festado de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo. La Kongreso estos inaŭgurita la 26-an de julio, precize cent jarojn post la tago, kiam en Varsovio aperis la Unua Libro de d-ro Zamenhof. La Estraro de UEA elektis por la Kongreso la temon: "Esperanto - cent jaroj de internacia kulturo". La kongresa programo tial havos, pli ol kutime, festivalan karakteron.

100 JAROJ de ESPERANTO-KULTURO ZAGREB, 1987-08-02/09

Zagreb estas urbo kun riĉa kulturheredaĵo, universitata centro kun 300-jara tradicio. Ĝi estas ankaŭ sufiĉe konata Esperanto-centro. En ĝi aktivas tri Esperanto-societoj, ĉ. 1500 zagrebanoj parolas Esperanton. En Zagrebo aktivas Internacia Kultura Servo, tie ĉi aŭguste okazas Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en kiu esperantlingve ludas la plej bonaj mondaj profesiaj pupteatroj. Jam 30 jarojn ĉiusemajne estas elsendata esperantlingva radio-elsendo. Multaj kulturagantoj kaj artistoj en Zagreb samtempe estas esperantistoj. En Zagreb ĉi

esperantisto povus senti sin hejme.

Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj Kro-
atia Esperanto-Ligo inter la 2-a kaj 9-a
de aŭgusto 1987 aranĝos kultursemajnon
en Zagreb. Okazos internacia koncerto,
Pupteatra Internacia Festivalo, programo
de profesiaj teatroj, programo de amato-
raj teatraj ensembloj, radiaj, televida-
kaj filmaj prezentoj pri Esperanto, eks-
pozicioj pri Esperanto, internacia sim-
pozio "Lingvaj problemoj de internacia

komunikado kun partopreno de pluraj
specialistoj de Unuigintaj Nacioj kaj
tiu de specialigitaj internaciaj orga-
nizoj.

El la distraj programoj: Interna-
cia balo, folkloro festo en vilaĝo, Es-
peranto-Foiro, laborgrupoj, duontaga
ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo.

Pri la jubilea manifestado "100 ja-
roj de Esperanto-kulturo" aperis triko-
lora informfolio. Adreso: Kroatia Espe-
ranto-Ligo, Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zag-
reb.

JUBILEA KONKURSO DE RADIO POLONIA

Lige kun la 100-jariĝo de Esperanto RADIO POLONIA organizas konkurson kaj invi-
tas vin al la partopreno. Por partopreni la konkurson sufiĉas respondi al nur unu
demando:

- 1/ Kiaj pensoj venas al vi lige kun la 100-jariĝo de Esperanto, ĝisnuna aplikado kaj
ankau evoluo de ĉi tiu lingvo?
 - 2/ Kiagrade la kono de Esperanto ebligis al vi pli bonan ekkonon de la mondo?
 - 3/ Ĉu en via lando /urbo/ oni faras ion por omagi la 100-jariĝon de E-o kaj se jes,
kion?
 - 4/ Kiel vi pritaksas la nunan staton de la lingvo, kiel ĝi devus evolui kaj kiaj es-
tas viaj ĉi-koncernaj esperoj?
- La E-elsendoj de RADIO POLONIA akompanas la E-movadon ĉiutage de pli ol jarcent-
kvarono. Lige kun tio oni dezirus ekscii:
- 5/ Kion vi opinias pri la signifo de la E-elsendoj de RADIO POLONIA por la E-movado
kaj ilia rolo en la informado pri Pollando kaj kian signifon por vi persone havas
ĉi tiuj elsendoj?
 - 6/ Kiaj estas viaj program-proponoj por estonteco? Kiujn temojn, program-ideojn in-
das realigi en niaj elsendoj en la plej proksima estonteco? Ĉu kaj se jes, kiel
oni devus/povus pli vaste popularigi ilin en la esperantistaj medioj?

Oni refoje substrekas, ke sufiĉas respondi nur unu demandon por partopreni la
konkurson. Inter ĉiuj partoprenantoj de la konkurso oni lotumos multe da E-aldonaĵoj,
sonkasetoj kun la voĉo de Doktoro Zamenhof, diapozitiv-seriojn kun E-tekstoj ktp.
Krome la aŭtoroj de la plej interesaj konkursaĵoj ricevos aldonajn premiojn i.a. en
la formo de polaj popolaritaĵoj.

La respondojn sendu ĝis la 30-a de novembro 1987 al: RADIO POLONIA, Esperanto-
Redakcio, 00-950 VARSOVIO, Box-46, Pollando - kun la kromfoto sur la koverto "ESPE-
RANTO-KONKURSO". La rezultojn de la lotumado oni anoncos la 15-an de decembro 1987
en ĉiuj tiutagaj E-elsendoj de Radio Polonia.

La Esperanto-Redakcio de Radio Polonia invitas partopreni la konkurson kaj de-
ziras sukceson en la lotado de la premioj.

La 22-an de januaro 1987 radiostacio
Praha en la populara elsendo Kolotoč (Ka-
ruselo) dissendis programon pri F. V. Lo-
renc, aŭtoro de la unua lernolibro de Es-
peranto por ĉejoj kaj pioniro de la E-mo-
vado en Brazilo.

Radiostacio "Vltava" (ultrakurtaĵ
ondoj) elsendis la 24-an de majo 1987,
en la rubriko Dveře dokořán (Pordo mal-
fermita) intervjuon kun Vuk Ehtner, pri
lia laboro por blinduloj kaj por Esperan-
to.
J.Mařík



EL FERVOJISTA MONDO

Fervojistaj Jarkunveno en GDR

Fariĝis jam tradicio, ke ĉiujare aŭtune la fervojistaj esperantistoj en Germana Demokratia Respubliko aranĝas jarkunvenon, kies tasko estas taksii la rezultojn de la kurenta jaro, fari konkludojn kaj determini planojn kaj taskojn por estonta periodo.

Lasta, jam la 8-a jarkunveno okazis de la 31-a de oktobro ĝis 2-a de novembro 1986 en la pitoreska harcurbeto Stolberg en okcidenta parto de GDR. Laŭ invito de la organizantoj partoprenis esperantistoj-fervojistoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando.

La jarkunveno okazis en la luksa feriejo de VEB Energiekombinat Halle, kie ĉiuj partoprenantoj ankaŭ logis.

Post vendreda interkona vespero, dum kiu oni post komuna vespermanĝo geje babilis kaj kantis, la sabata konferenco solene inauguris prezidanto de FE GDR Joachim Meinel. Post himno kaj salutakcepto de ĉiuj partoprenantoj li vive kaj interese raportis pri la tutjara laboro kaj agado. Membraro ne multe kreskis. Bulteno "Fervojistaj novaĵoj" regule aperadis dank al senlaca redakta laboro de kolego Horst Jasmann. Kiel aldono de "FN" aperis jam 72 paĝoj de listigitaj fakterminoj, rezulto de la terminara laboro, gvidata de kolego Horst Theurich. Post kompleta fintrakto de la terminoj oni resumas ĉion en fakvortaro, kiu poste estos havebla laŭ mendo. Tute nekontentiga estas informado kaj sperigado de fakartikoloj en la fakneesperantista gazetaro. Neniu pro devizaj malfaciloj partoprenis la 38-an IFEF-kongreson en Skopje. Oni aranĝis aŭ partoprenis kelkajn aranĝojn ne nur en GDR, sed ankaŭ en ĈSSR, Hungario kaj du reprezentantoj partoprenis ankaŭ la 3-an kongreson de la pola esperantistaj fervojistoj en Wazne Mlynny. En 1987 oni planas partopreni IFEF-kongreson en Katowice kaj kelkajn aranĝojn en ĈSSR, Hungario kaj Pollando. Oni proponis, ke omage al jubilea centjaro de Esperanto en 1987 ĉiu ano de fakgrupo varbu po unu kolego aligi kaj labori en fakgrupo, tiamaniere oni povus duobligi la membraron.

Poste salutparolis kaj informis pri agado de siaj sekcioj reprezentantoj de la invititaj kunlaborantaj sekcioj el ĈSSR, Hungario kaj Pollando. La pola reprezentanto invitis ĉiujn multnombre partopreni la venontan 39-an IFEF-kongreson en Katowice.

Oni devas menciigi ankaŭ la okazintajn fakprelegojn. En unu d-ro Heinz Hofmann interese prelegis pri sekurectekniko de DR kaj pri sekurigo de la trajnaveturoj en fervojstacioj kontraŭ dangerigaj veturoj de aliaj trajnoj aŭ rangvegonaŭveturoj. Dum alia prelego ni helpe de koloraj diaĵildoj ekkonis Harcmontonon kaj tien mallarĝspuran fervojlinion, kiu traveturas la montaron kaj disponigas al vojaĝantoj ravan panoramon. Ankaŭ diaprogramo kun folkloro makedona muziko prezentita de la hungara kolego Ferenc Hersy pri la 30-a IFEF-kon-

greso en Skopje interesigis ĉiujn partoprenantojn per sia informri-
ceco kaj ebleco ekoni krom kongresarangoj ankaŭ la rave belajn vi-
zilitajn lokojn en Jugoslavio.

Al la programo jam tradicie apartenas ankaŭ ekskursoj por in-
terkonatigo kun loko kaj ĉirkaŭa regiono de la jar-konferenco. Dum
la unua ekskurso sabate posttagmeze ni kun sperta cicerono prome-
nis tra arbaroj norde de Stolberg tra lokoj, kie oni en mezepoko
eksploatis argentercon. Kulmino de la ekskurso estis supreniro sur
40 metrojn altan stalkonstruaĵon - observen turon "Jozefa kruco",
kiun sur unu el la montosuproj konstruis en 1890 la konata arkitek-
to Karl Friedrich Schinkel kaj de kie oni vidas belan panoramon de
la ĉirkaŭa regiono.

Dum la dua ekskurso dimanche antaŭtagmeze ni komune vizitis
harĉurbeton kaj konatan feriolokon Stolberg. Krom la gotika paroke
pregejo sur monteto malsupre de la kastelo ni travigardis multajn
tipejn mezepokajn domojn el la 15-a kaj postaj jarcentoj, inter il-
li ankaŭ la patrujsciencan muzeon kun ekspoziciaj tie memoraroj
pri la vivo kaj agado de la kamparana ribelulo Thomas Muntzer, kiu
naskigis en Stolberg en 1490.

Jindřich Tomíšek

Ĉarmo de la vaporo kaj fumo

Ekfajfo de la lokomotivo, eksiblo de la vaporo, nigra kolono
de fumo - kaj la trajno ekmove sin. La bildo, kiun oni praktike
kones ofte nur el filmoj kaj malnovaj fotografajoj. Sed en Germana
Demokratia Respubliko ankoraŭ nuntempe ekzistas kelkaj mallargspu-
raj linioj, kie trafikis zorgeme riparataj kaj trafikakapabligitaj
vaporlokomotivoj, speciale fabrikataj por tiuj ĉi linioj fare de
laborantoj en Babelsberg apud Postdam.

Unu el tiuj deku mallargspuraj fervojlinioj sur teritorio de
GDR estas la harĉfervojo kunliganta Nordhausen kun Wernigerode -
urbeto en Harcmontaro. Pli ol sesdek kilometrojn da tiaj fervojli-
nioj ĉiujare logas dekmilojn da turistoj el GDR kaj eksterlando.

La 27-an de marto 1899 la unuan fojon ektrafikis vaporlokomo-
tivo sur tiu ĉi harĉmontara linio. kvarcent pontojn, transveture-
jojn kaj malgrandajn viaduktojn oni devis konstrui je la montarli-
nio por plenumi revon de la loka logantaro, havi fervojan linion
kunliganta urbetojn kaj vilaĝojn en Harcmontaro. La konstrulaboris-
toj devis translokigi naŭdek mil kubometrojn da teraĵo kaj laŭvorte
"tramordi" en multaj lokoj tre malmolan graniton. Harĉfervojo havas
ankaŭ sian kuriozaĵon. kiam posedantoj de la tiama fervoja kompanio
eksciis, ke en Bavario kaj Aŭstrujo preskaŭ ĉiu fervojlinio trafikis
tra tuneloj, ili ordonis konstrui tunelon ankaŭ inter Nordhausen
kaj Wernigerode, kvankam ĝi ne estis tie necese. Ĝi estas nur sepdek
metrojn longa, sed dum unuaj jaroj de la trafiko sur tiu ĉi fervojo
la fervojistoj kaj pasaĝeroj pro ĝi multe fieris. Nuntempe la ses-
dekkilometra linio servas antaŭ ĉio por transportado de ligno kaj
konsumveroj, sed ankaŭ kiel feria allogaĵo por turistoj.


Generale oni povas diri, ke la historia fervojo en GDR estas
hobio de multaj homoj. Oni ofte arangas ekspoziciojn de vaporlo-
komotivoj, kiuj jam finis sian trafikservadon sur fervojaj linioj,
sed tamen restas demonstrativaj ekspoziciaĵoj pri historia evoluo

de la trafiko.

Ĉirkaŭ kvardek tiaj lokomotivoj troviĝas en fervoje parto de la trafika muzeo en Dresdeno kaj plena duono de ili estas trafik-kapabla. Inter la plej interesajn apartenas rapidtrajna lokomotivo kun tri pelaksoj, kiu povis veturi per rapido 175 km/h. Atenton de la vizitantoj altiras ankaŭ la tielnomata prusa lokomotivo P-8 de tipo 38, konstruita en 1914 kaj kvin vaporlokomotivoj el la jaro 1889 por mallargspuraj fervojlinioj.

Alia solenaĵo atendas emikojn de la fervojoj en la jaro 1989, kiam okaze de 150-a datreveno de la longdistance fervoja transporto sur germana teritorio inter urboj Leipzig kaj Dresdeno veturos sur la koncerna fervojlinio ekzakta kopio de la sama rapidtrajna lokomotivo Saksonia.

Jindřich Tomášek



turisma mondo

SOMERA ESPERANTO-TENDARO, LANĈOV, ĈEĤOSLOVAKIO

1-a etapo: 26. 6. 1987 - 11. 7. 1987

2-a etapo: 12. 7. 1987 - 25. 7. 1987

3-a etapo: 26. 7. 1987 - 8. 8. 1987

Detalajn informojn disponigas kaj akigojn akceptas: Esperanto-Klubo Třebíč, CS-674 01 TŘEBÍČ, Ĉeĥoslov.

Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio, ekde la tempo de la 1-a de majo ĝis la 30-a de junio kaj de la 12-a de aŭgusto ĝis la 31-a de oktobro funkcias kiel KABANA KOMUNUMO, KATEGORIO B por via refreŝigo. Vi povas en ĝi travivi aŭ unu aŭ du semajnojn en vere bela kaj trankvila medio ĉe la valbaraĵo de Vranov.

La prezo por unu kabano kun 4 litoj kaj kun necesa ekipaĵo estas 150 Kčs por unu tago.

Esperantistoj kun valida legitimilo ricevos dekprocentan rabaton. Por la dispo-
no estas kuirejeto kun necesa ekipaĵo, gasforno kaj gaskuiriloj. Memstaraj necesejoj kaj lavejoj estas en la arealo de la komunumo. Varma fluanta akvo kaj duŝoj je dis-
pono.

En la distanco de 200 m de la komunumo estas banado kaj ankaŭ vendejo. Granda vendejo kaj restoracio troviĝas en vilaĝo Lančov - distanco de 1 km. En la restora-
cio eblas mangi.

Urbeto Vranov estas per piede en distanco de 3 km, per aŭtomobilo 5 km. En la komunumo troviĝas aŭtoparkejo. Proksimume 25 km vi bezonas por atingi urbon Znojmo.

Pluajn informojn vi povas ricevi ĉe Esperanto-Klubo Třebíč, ĈSSR. Sufiĉas skribi al: ESPERANTO, CS-67401 TŘEBÍČ, Ĉeĥoslovakio.

Esperanto-Klubo en Nová Dubnica aranĝos kulturajn tagojn sub la nomo BELSONEKO DE L' VORTO

sabate kaj dimance la 12-an kaj 13-an de septembro 1987 en Nová Dubnica. En la pro-
gramo estos deklamado de poezio kaj prozo, kantoj, ŝercoj, lumbildoj kaj raporto
pri somera agado kaj ankaŭ dancado. La partoprenon jam promesis krom aliaj unu grupo
de hungaraj s-anoj. Ĉar la lokoj por tranoktado estas limigitaj skribu tuj al: Klubo
Esperanto, Mestské kultúrne stredisko, Mierové námestie, CS-018 51 Nová Dubnica,
Ĉeĥoslovakio.

INTERNACIA JUBILEA SEMAJNO EN HUNGARIO

Hungara Esperanto-Junularo invitas la gejunulojn al ripostendaro en Hungario, inter la 10-a kaj 16-a de julio 1987 en la urbo Szeged. La programo antaŭvidas plej diversajn amuzajn kaj seriozajn programerojn, kiel seminariojn pri medioprotektado, komputado, movada progreso ktp. same kiel noktan banadon, fiskaptan konkurson, ekskursojn, bivakfajrojn ktp. Ĉe la fino de la semajno oni komune veturos al Pollando. Dum la semajno oni loĝos en aparta tendaro en 2-6-litaj ĉambroj, tuj apud la rivero Tisza. Eblas ankaŭ tendumi per propra tendo. La partoprenkotizo inkluzivas la loĝadon, mangadon kaj programojn. Gejunuloj el socialismaj landoj povas pagi surloke en forintoj.

La partoprenkotizoj:

Kategorio I. (loĝado en 2-4-litaj ĉambroj)	2040 Ft. / 120 gld.
- aliĝo post 1-a de junio:	2400 Ft. / 140 gld.
Kategorio II. (loĝado en 4-6-litaj ĉambroj)	1500 Ft. / 90 gld.
- aliĝo post 1-a de junio:	1860 Ft. / 110 gld.
Kategorio III. (loĝado en propraj tendoj)	1000 Ft. / 60 gld.

Adreso de la organizantoj: Hungara Esperanto-Junularo, Szilvási László, H-1368 Budapest pk. 193, Hungario.

ESPERANTISTAJ FERIADOJ EN MIĘDZYGÓRZE

En 1987 okazos du feriskipoj, ĉiu por 480 partoprenantoj:

La 6-a Internacia Feriado "Esperanto hejme", kiu okazos en la tagoj 2-15 de aŭgusto 1987.

La 23-a Internacia Esperantista Feriado "Ora pola aŭtuno", kiu okazos en la tagoj 2-15 de septembro 1987.

Pitoreska ripozloko Międzygórze situas 130 km sude de la regiona urbo Wrocław. Enloĝigo kaj programo en 14 apude situantaj alpatilaj ripozdomoj de la Ferientrepreno "FWP". Arbokovritaj montoj kaj kvietaj, virge idiliaj valoj, kiujn trapasas kristalakvaj torrentoj, rica reto da vagvojetoj kauzas, ke Międzygórze estas vera paradizo por pasiaj vagantoj.

Programo: Diversgradaj konversaciaj kursoj, fundamenta kurso laŭ "Ĉseh-metodo", Ĉseh-Seminario por instruantoj, esperantologia seminario, kultura kaj distra programo en Esperanto, lumbildprelegoj, kantvesperoj, diskodancado, maskobalo, ĝojfajro, montaraj piedekursoj, aŭtocaraj ekskursoj k.a. Samtempe okazas kelkaj kursoj aŭ programoj laŭvole elekteblaj. Kadre de ambaŭ feriskipoj okazos tradicia renkonto de esperantistaj familioj kaj gentoj. En la feriskipo "Esperanto hejme" estas antaŭvidita rica kaj atrakcia programo por infanoj kaj junularo kaj Ĉseh-Seminario por instruantoj.

Kiel atingi Międzygórze? De Wrocław - la ĉefurbo de Malsupra Silezio - oni devas veni per trajne al la urbo Bystrzyca Kłodzka /112 km suden/ kaj de tie al Międzygórze trafikas multaj aŭtobusoj /15 km/. Ĝie la ripozdomoj mem kondukas bona, asfaltita ŝoseo. Bystrzyca Kłodzka posedas senperan trajnan kunligon kun Praha.

Partoprenkotizoj por dusemajna restado estas 390 guldenoj. La kotizo ampleksas dormlokon en 2, 3 aŭ 4-persona ĉambro, 3-fojan mangadon tage, partoprenon en kursoj, seminarioj kaj distraj arangoj. Aŭtocaraj ekskursoj estas pagendaj aparte surloke en Międzygórze. Por infanoj ĝis 7-jaraj, kiuj ne okupas apartan liton, oni povas pagi nur mangokostojn, surloke post la alveno.

Aligilojn oni devas sendi al la adreso: Pola Esperanto-Asocio, P. O. Kesto 16, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando.

Al feriadoj en Międzygórze oni rajtas aliĝi kun akompanantaj parencoj, kiuj ĝis nun ne konas Esperanton kaj nur dum la feriado partoprenos la fundamentan kurson. La familianoj, kiuj ĝis nun hezitis lerni la internacian lingvon, konstatos ĝian utilcon.

JUNULARA ESPERANTO-RENKONTO EN BESKIDMONTARO /JERB'87/

Estraro de la Rondo de Pola Esperanto-Asocio en Andrychów invitas Vin al la JERB'87 okazantaj en la tagoj 25. - 28. 6. 1987 en urbo Bielsko-Biała /suda Pollando/.

En la programo: ekskurso al Beskiĉa montaro /Szczyrk, Wisła, Istebna, Koniaków, Zywiec/, ekskurso al Oświęcim, kie vizito de muzeo - hitlerana koncentrejo Auschwitz-Birkenau, kaj al Wadowice, kie naskigis la Sankta Patro Johano Paŭlo II, promeno tra Bielsko-Biała, projekciado de diapozitivaj, kultura programo, kantado, danĉvespero, renkontigo kun lokaj esperantistoj ktp.

La unua servo estas vespermanĝo la 25-an de junio, la lasta matenmanĝo la 28-an de junio 1987. Partoprenantoj loĝos en junulargastejo de PTSM en 6-litaj cambroj. La nombro de la disponeblaj litoj estas limigita! Partoprenkotizo por gastoj el socialismaj landoj estas 4.500 polaj zlotoj. La kotizo inkluzivas manĝadon, tranĉkanton, ekskursojn, organizaĵojn elspezojn.

Informojn petu kaj la aligilojn sendu ĝis la 31-a de majo 1987 al: PAWEŁ NOWAK, P. O. Kesto 30, PL 34-120 Andrychów, Pollando.

INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO EN FINLANDO

Esperanto-klubo de Helsinki organizas ĝin en Hankoniemi 12. - 18. 7. 1987. La programo de la Internacia Esperanto-semajno proponas interesajn travivaĵojn al spertaj esperantistoj kaj ankaŭ al tiuj, kiuj unuafoje konatiĝas kun la lingvo. Antaŭtagoze estos lecionoj kaj prelegoj, posttageze komunaj arandoj kaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ vespere estos okazaĵoj, i. a. ce bivakfajro, ec la tipe finna saunumado ne estas forgesita.

Kiel kursejo funkcios la kristana instituto de Hankoniemi ce la Balta maro. La instituto havas plurajn prelegejojn kaj loĝejon por c. 70-80 partoprenantoj. Krom enlandaj partoprenantoj al la semajno venos gastoj almenaŭ el aliaj skandinaviaj landoj, Francio, Hungario kaj Pollando. Tiel ĝi fariĝos bonega okazo por praktiki Esperanton kaj ligi novajn kontaktojn per ĝi. La partoprenantoj povas studi en tri studgrupoj: A. konatiga kurso (gvidos ĝin Silja Kivekäs), B. progresiga kurso (gvidos Daniel Moirand el Francio), C. cent jaroj de Esperanta kulturo (prelegos i. a. Erno Csizsár el Hungario, Daniel Moirand el Francio, Jouko Lindsted, Harri Iaine, Erik von Hertzen kaj Sakari Kauppinen).

La tuta arando, kiu inkluzivas loĝadon, tri manĝojn potage, ekskursojn kaj instruadon, kostas 700 Fmk. Se vi loĝos en tendo aŭ karavano, la prezo estas nur 600 Fmk. Pliajn informojn donos Esperanto-klubo de Helsinki, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 HELSINKI, Finnlando.

10-A INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto de la 13a ĝis la 20a de septembro 1987. Profitu trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj ce mediteranea bordo. Ĉi tiun jaron la programo estos aparte interesa, car ni intencas samtempe festi nian 10an internacian semajnon kaj la Esperantan Jubilon. Ce ni vi trovos plurajn nivelojn de E-aj kursoj kaj ankaŭ banadon, fiskaptadon, ekskursojn kaj ... bonan manĝaĵon.

Restadkoto kun tri manĝoj: 150/160 FF tage. Ebleco tendumi proksime.

Aligo/Informo: ESPERANTO, 5 rue du Dr Roux, 34000 MONTPELLIER - FRANCE.

La jubilea X-a TREE en Karlovy Vary ne okazos de la 11-a ĝis la 13-a de septembro, kiel estis anoncita, sed du semajnojn poste, t. e. ekde la 25-a ĝis la 27-a de septembro.

TRADUKADO

1. Beletre tradukado

En ĉiuj literaturoj de la mondo la beletro tradukita antaŭis la originalan. Ankaŭ Esperanto ne estas escepto, male la traduka literaturo havas por ĝi cefan signifon, ĉar la tradukanto, ne rajtante eviti malfacileajn lokojn, devas ĉiam trovi kontentigajn solvojn de ĉiu lingva aŭ stila problemo. Tiamaniere la tradukado grave evoluigas la lingvon, enportante en ĝin novajn frazeologiaĵojn, idiomojn kaj proverbojn, disvolvante ĝiajn proprajn stilistikajn kvalitojn kaj eblojn.

Tamen estus eraro pensi, ke por bona tradukado sufiĉas majstri ambaŭ lingvojn kaj posedi iom da stilista talento. La tradukisto devas bonege prepari sin teorie por sia laboro kaj konscii pri siaj rajtoj kaj devoj. La asertoj, ke iu traduko estas "pli bona ol la originalo", estas same ridindaj kiel fanfaronado per "pli rapida horlogo", kaj atestas, ke oni miskomprenis la taskojn de la tradukado.

Pri la problemoj de beletra tradukado estis esprimitaj multaj opinioj, kiuj ofte kontraŭas unuj la aliajn, ekzemple:

- La traduko devas laŭvorte reprodukti la originalon
- La traduko devas reprodukti la ideon de la originalo
- La traduko devas esti legebla kiel la originala verko
- La traduko devas malkaŝi, ke ĝi estas traduko
- La traduko devas konservi la stilon de la originala aŭtoro
- La traduko devas emfazi la individuan stilon de la tradukinto
- La traduko devas havi la koloron de la tempo, en kiu estigis la originalo
- La traduko devas havi freŝecon de la tempo de sia estigo
- La traduko ne permesas aldonadon aŭ eliminadon
- La traduko povas la originalon kurtigi aŭ kompletigi

Se oni volas orientigi en la problemaro, necesas reveni en la historion.

2. El la historio de tradukado

La mezepoka tradukisto la nereligiajn tekstojn simple alirakontis, konsiderante la rezulton sia propra verko, dum la religiajn skribaĵojn li tradukis per sklaveca laŭvorteco, vorton post vorto, perfortante eĉ la gramatikon, kvankam la rezulta teksto estis preskaŭ nelegebla kaj malfacile komprenebla. Sed li ne kuragis "korekti la vortojn de Dio".

La humanismo jam postulis, ke oni ne traduku izolajn vortojn, sed signifon post signifo, ideon post ideo, kaj ke oni uzu korektan kaj facile kompreneblan lingvaĵon. La protestantismaj tradukoj de Biblio eĉ aktualigis vivrealaĵojn, anstataŭigante turbenojn per ĉepeloj, papirusajn volvaĵojn per libroj, kuŝadon ĉe la mango per siĝado k.s.

La baroko pro propagandaj, kontraŭ-protestantismaj celoj klopodis folklorigi la tradukojn ankoraŭ pli, por ke ili facile disvestigu en la popolo kaj helpu likvidi la influon

de la protestantismo. Male, la fiera klasikismo konsideris ĉion folkloran maldigna por la literaturo; la tradukistoj penis rivale "pliperfektigi" la aŭtoron, elstreki "nepoezian" /ekz. nazpurigadon/, uzi sole poetismajn esprimojn. Ambaŭ manieroj estas misaj, uniformigantaj la verkojn kaj senigantaj ilin de la originaleco. La aŭtoroj ofte uzas diferencajn stilojn por karakterizi la unuopajn heroojn de siaj verkoj; en la folklorigitaj aŭ poetigitaj tradukoj la karakterizaj diferencoj malaperas.

La romantikaj tradukistoj pietate subigis al la aŭtoro, dezirante prezenti lin al la legantaro tia, kia li efektive estas, ĉe kun liaj mankoj, konservi lian stilon kaj esprimmanieron. Kiel idealo estis por ili traduko preskaŭ laŭvorta, imitanta ĉiujn apartaĵojn de la originalo, ĉe se ili impresis strange kaj nenature en la traduko, ĉar la romantikuloj opiniis tiujn apartaĵojn karakterizaj por la aŭtoro.

La realisma traduko klopodis aspekti kiel originalo, se la aŭtoro verkus ĝin en la lingvo de la tradukisto. La traduko imitis la stilaĵn manieron kaj kutimojn de la aŭtoro, aplikante ilin je la nova lingva materialo. La interpretisto ne tradukis laŭvorte la karakterizaĵojn de la aŭtoro, sed serĉis en sia propra lingvo esprimilojn, havantajn similan efikon. Ĉar la realisma tradukisto deziris, ke lia traduko impresu la leganton same kiel la originalo, li ofte transportis la scenejon de la rakontado el fremda lando kaj malproksima pasinteco al sia lando kaj sia epoko. Sed tielaniere li sangis la kolorecon kaj atmosferon de la rakontado.

La naturalistoj konsideris sia devo konservi la nacian karakteron de la verko, por ke la leganto sentu, ke li legas romanon englan, francan, rusan ktp. Ili ne nur ne transportis la scenejon, sed klopodis akcenti la fremdan medion spicante sian tradukon per fremdismoj /anglismoj, francismoj, rusismoj/. Ili ekzemple tradukis kelkajn idiomojn aŭ proverbojn laŭvorte, de tempo al tempo konservis nekutiman vortordon k.s. Sed ankaŭ tio estis eraro, la fremdismoj ĝenas la leganton, aspektas nenature.

3. Modernaj postuloj

Laŭ modernaj postuloj la tradukisto devas prezenti al la publiko ne sin mem, sed la tradukatan aŭtoron, ne plibonigadi lian verkon laŭ sia bontrovo, sed interpreti ĝin kun ĉiuj kvalitoj pozitivaj kaj negativaj. Se la aŭtoro uzis en la verko diversajn stilojn por karakterizi siajn heroojn /nobelojn, pastrojn, soldatojn, maristojn, kampanojn, laboristojn ktp./, la stiloj devas resti en la traduko konservitaj en plena riĉeco kaj esprimiveco. Ĉiun esprimon necesas traduki ne nur laŭ ĝia priskriba signifo, sed ankaŭ kun ĉiuj nuancoj kaj stilaĵvaloroj, por ke la sceno konservu sian atmosferon, kolorecon kaj sent-espriman ŝargon kiel en la originalo. La ideo de la verko devas resti ne sangita kaj nedeformita. La nacian karakteron de la verko necesas konservi ne per formalaj, nenaturaj rimedoj, sed simple ne rompante ĝin, ne transportante la scenejon de la rakontado en la landon de la tradukisto. Tia transporto - ĉe subkonscia - okazas, kiam oni tradukas familiajn nomojn /ekz. sinjoro Brown el angla romano al sinjoro Bruna, kiu

perdas sian anglan karakteron/. se oni uzas dialekton, kiu lo-
kigas la rekotadon en certen regionon en la lendo de la tra-
dukisto, se oni uzas frazeologiaĵojn, kiujn la herooj en la
rakonto ne povas koni /ekz. "Judasa kiso" en romano pri antik-
vaj grekoj/ ktp.

4. La principo de tradukado

Beletrajo per artismaj rimedoj bildigas la realon kaj esprimas ideojn kaj celojn de la aŭtoro, per kiuj li volas impresi la leganton. La lingva materialo ebligas al li krei frazojn, kiuj en la cerbo de la leganto elvokas la intencitajn bildojn, ideojn kaj celojn. La tradukisto unue kiel leganto devas kapti la bildigojn kaj kompreni la intencojn de la aŭtoro kaj poste reesprimi ilin per la materialo de sia lingvo. La samaj vortoj kaj vortkombinoj eĉ en tre parencaj lingvoj preskaŭ neniam havas absolute identajn signifon, nuancon kaj stilan uzeblon, male ofte ili estas tre diferencaj, eĉ kontraŭaj. Tial ne eblas traduki laŭvorte kaj samtempe fidele, ĉar la fideleco ne bazigas sur vortoj, sed sur esprimitaj ideoj. Al la fideleco apartenas ankaŭ beleco, sed oni ne konfuzu ĝin kun kica placeco. Se iu esprimo en la originalo estas plursignifa kaj ebligas plurajn diferencajn eksplikojn, la tradukanto devas elekti tiun varianton, kiu pleje akordas kun la tuta ideo de la verko. La tradukisto devas tre bone koni la tradukatan beletrajon, ĝiajn scenojn kaj la naturon de ĝiaj herooj, por ke li povu traduki ne laŭ vortoj, sed laŭ la bildigita realo. Tamen rompi la laŭvortecon senbezono estas ankaŭ eraro. La principo de neceso kaj sufiĉo validas ankaŭ ĉi tie.

La traduko estas sencesa decidado inter pluraj eventualoj de interpretado. La elekton influas la celoj, por kiuj la tradukisto laboras. Alie tradukas profesoro preparanta helpilon por siaj gestudentoj de fremda lingvo, alie artisto, deziranta abundigi la literaturon de sia lingvo. Kiam la traduklingvo estas nur disvolviganta, la tradukisto volas ricigi ĝin per novaj vortoj, idiomoj, proverboj kaj aliaj esprimoj, kaj tio kondukas lin al laŭvorteco kapablanta "ŝteli" la bezonatajn stilajojn. Se la lingvo jam plene literature disvoivigis, la tradukanto koncentras sian atenton sole al la artismaj kvalitoj de la verko. Ĉiuj solvoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn, sed preskaŭ neniu absolute identas kun la originalo. La tradukisto devas decidi, kion li preferos kaj kion li pribedeuros. Nove kreita kaj enkondukita esprimo povas la lingvon ricigi, sed ĝi samtempe tiras al si la atenton de la leganto kaj rompas tiamaniere la artan efikon. La tradukanto anstataŭ resti modeste kasita malantaŭ la aŭtoro, tro emfazas sin mem kaj entrudas sian vortkreivan lertecon al la leganto. Tia tradukado estas gusta, nur kiam la aŭtoro mem tiel vortludas.

Multaj esperantistoj lasas sin influi per impresoj, ke plurvorta traduko de unuvorta esprimo estas ia perdo atesanta pri malriceco de la lingvo. Tial ili klopodas traduki unu vorton de la originalo ĉiam per unu vorto en Esperanto, eĉ se estigas monstra kunmetaĵo, plene altiranta al si la a-

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

re de defendanto (per iu frapo, rompumo, strangolumo aŭ everto) oni ne povas aprobi, ĉar sukcesa efektivigo de tiaspecaj defend-agoj dependas de multaj kondiĉoj, kies plenumo ne estas facila au estas ekster la povo de la defendanto aŭ parte, aŭ tute (+). Pli multe pri la temo vidu en la ĉeĥa verko (1).

Kontraŭ armitan atakanton oni laŭeble ĉiam apliku okazajn rime-dojn. La menciita sinjoro X, kiu iris hejmen tra danĝera loko, certe faris bone, se li enmanigis ŝtonon. Li povis per ĝi bati (la t.n. man-kojno), aŭ ĵeti ĝin al la kontraŭulo. Certe, la defendanto, kiu ĝis nun lernis nenion, havas preskaŭ nenium alian eblecon por efike defendi sin.

1.7. Uzado de insidatiko

El ĝisnuna klarigo videblas, ke la insidatikon fare de kontraŭulo oni evitu ĉiapreze. Se oni produktas la sindefendo-situacion nur iom ĝuste, oni povas kun granda probablo sukcesi. Tamen eĉ oni mem povas iufoje apliki la insidatikon. En konscio de la plimulto de homoj la nocio insidatiko estas asociita kun sento de io malhonesta, io, kio troviĝas jam eksterlime de leĝo. Kiel montris jam Schopenhauer (So-penhauer), la t.n. batalo frunto kontraŭ frunto signifas nenion alian ol bazi sian agadon sur perforto, ĉar venkas tiu, kiu estas pli rapida, forta k.t.p., do ne tiu, kiu estas pli honesta.

Tamen kiamaniere oni apliku en la sindefendo insidatikon, defendante sin kontraŭ perforton? Imagu, ke iu estas endanĝerigata ekzemple fare de tri atakantoj kaj vi volas helpi lin. Kio estas pli efike? Neokulfrape pliproksimigi sin kaj subite ataki la unuan atakanton kaj poste batali kontraŭ la duan, dume la defendanto, al kiu vi helpas, havas nun kontraŭ sin nur unu atakanton, aŭ senutile atentigi pri si kaj poste batali sola, eventugle kontraŭ du batalpretajn kontraŭulojn? Neatandita atako povas kaŭzi, ke la atakantoj fuĝos. En la prezentita okazo oni do agus plej prudente, komencante la batalon per insidatiko (la t.n. situacia insidatiko). La atakantoj tre ofte eĉ ne konsideras la defendanton (ekzemple en gapanta popolamaso k.t.p.) kiel eventualan kontraŭulon, sekve de tio lia atako povas esti ege surpriza kaj efika.

Krom la situacia insidatiko ekzistas ankaŭ la tiel nomata embuska insidatiko, ĉe kiu la atakito ne identigis ĝis la komenco de la atako sian kontraŭulon. Se ni, reveninte ekzemple hejmen, konstatas, ke iu dediĉas nedezirindan atenton al nia havaĵo kaj estas tiomgrade absorbata de sia agado, ke li ne rimarkas nin, tiam ni apliku tiun ĉi metodon.

(El la p.9) La paratojn povas atakanto vanigi ekzemple jene:

- 1) Atakanta (=armita) brako ĉirkaŭas paratantan brakon,
- 2) piko estas direktata tra la angulo inter la antaŭbrako kaj la HUMERO de paratanta brako en la brustokorbon,
- 3) piko estas plenumata sub la kubuton de paratanta brako,
- 4) atakanto ne pikas tuj post sia alproksimiĝo al defendanto, sed post 0,1 - 0,2 s tempointervalo,
- 5) atako celas paratantan brakon.

Noto n-ro 1: La unua metodo estas aplikebla ĉe eleksteraj, elinternejaj, elsubaj aŭ elsupraj pikoj. Ĝi estas tre efika, se atakanta batalanto povas anticipi la defend-metodon (specon de parato) aplikotan de kontraŭulo. La metodoj n-roj 2 kaj 3 utiligas la faktan, ke en la areo ĉe la kubuto de paratanta brako la paratoj ne estas sufiĉe efikaj. Okaze de la kvara metodo paratanto (ekzemple sinjoro X), anticipante la atakagon (t.e. pliproksimiĝo + piko) de sia kontraŭulo (sinjoro Y), ligas la komencon de sia defendago al lia pliproksimiĝo. Se la sinjoro Y ŝanĝas subite la ritmon de sia atako, la parato estas efektivigata nepre antaŭ la striktasenca atako (= movo de atakanta brako celen). Poste la sinjoro Y faras la striktasencan atakon jam kontraŭ la senpovan sinjoron X. Tiu ĉi metodo estas aligebla al la kvina metodo. La sinjoro Y atakas paratintan kontraŭul-brakon, kiu restas post la efektivigata defendago por momento en sia finpozicio.

Noto n-ro 2: Tute certe videblas, ke la metodoj, kiujn ni en tiu-ĉi libro rekomendas, estas ne sole pli facile ellerneblaj, sed ankaŭ ege pli efikaj kaj sekuraj por la defendanto ol la paratoj.

La uzado de insidatako estas tre oportuna. Se nur iomete eblas, oni klopodu transformi la situacion ĉiam en la situacion aŭ embuskan insidatakon. Kiel efektivigi tion efike, dependas de la spiritpreteco, scioj kaj intelekto de la defendanto.

Ni jam praktike elĉerpis la eblecojn, kiujn havas por sia defendo homo, nescianta sufiĉe fidinde iun frapon aŭ alian batalagon, kaj tiel devanta fidi aŭ okazajn rimedojn, kiujn li manipulas finfine ankaŭ nefakule, aŭ fuĝon. En sekvontaj ĉapitroj ni priskribos iujn elektitajn batalagojn kaj metodojn por apliki ilin. Sed kiel elekti la plej utilajn batalagojn? Por ke tiu ĉi problemu povu esti solvita respondece, oni devas klarigi kelkajn teoriajn sciojn, sen kiuj la esenco de la sindefendo ne estas komprenebla.

1.8. Reagotempo kaj sukcesa apliko de defendagoj

Kiel longe daŭras, antaŭ ol futbala golulo kapablas komenci movon, per kiu li ŝanĝu la direkton de la pilko, ŝotita al lia golejo, aŭ antaŭ ol ŝoforo ekagas de post la momento, kiam li neatendite ekvidis pasanton sur la ŝoseo? Similaj demandoj havas signifon ankaŭ ĉe pilotoj de jet-aviadiloj, boksistoj, skermistoj, ĵudistoj, karateistoj kaj ĉe multaj aliaj profesioj aŭ sportoj. Ĉu havas tiuj ĉi problemoj signifon ankaŭ en la sindefendo? En la sindefendo-situacioj la defendanto reagas laŭ ia agado fare de kon-

traŭlo. De tio, ĉu li kapablas eviti ekzemple la rektmanfrapon fare de kontraŭlo ĝustatempe, dependas, ĉu li estos trafita aŭ ne. Ĉi tie ne gravas sole la daŭro de la defend-ago (do de videbla movo) kompare kun la daŭro de la atakago fare de la kontraŭlo. Gravas ankaŭ, kiel longe daŭras, antaŭ ol oni entute kapablas komenci la movon de post la momento, kiam oni ekregistris la intencon de la atakanto. Tial ni diru nun iom pri la t.n. reagotempo.

Imagu, ke ni faras jenan eksperimenton: iu persono sidas en simila ĉambro kaj antaŭ si havas elektran lampeton. Tuj kiam la elektra lampeto eklumas, la persono premu prembutonon. La tempon de post la ekfunkciigo de la elektra lampeto ĝis la premo de la prembutono oni nomas la simpla latentan reagotempo (aŭ mallonge: la simpla reagotempo). Nur post ĝi komenciĝas la movo. Post multaj mezuradoj oni konstatis, ke la simpla reagotempo en tiuj ĉi laboratoriaj kondiĉoj faras ordinare (ĉe trejnitaĵ junaj personoj) 0,18 - 0,20 s.

La leganto sendube povas kontraŭdiri, ke en la batalo neniu lumigos por ni la elektran lampeton, sed simple batos nin, ekzemple per pugno. Memkomprene jes. Tamen ni volis nur demonstri, kiel longe daŭras, antaŭ ol homo entute estas kapabla fari ion kiel reagon. Kaj kiel longe daŭras rapidaj batalagoj? La rektmanfrapo farita de bone ekzercita homo 0,13 - 0,16 s. La manfrapo flanken 0,11 - 0,13 s. Laiko frapas certe alie kaj ankaŭ malpli rapide. Kune kun POREKTADO de la brako la manfrapo povas ĉe li daŭri 0,5 - 1,0 s. La ĝusta elsuba gambofrapo kontraŭ tibion daŭras 0,16 - 0,18 s (+). Sed nia okulo damaĝeblas eĉ de tute hazarda kontraŭlo-movo, per kiu li volis ekzemple forpuŝi nin. Ĝi povas daŭri 0,2 - 0,3 s. Tiu ĉi fakto estas zorgoveka. Nome, se la reagotempo daŭras ekzemple 0,2 s kaj la frapo ankaŭ 0,2 s, evidentas, ke la defendago efektivigata kiel reago ne povas plu esti efika, ĉar defendanto ne havas tempon por fari ĝin (li estos do trafita). Ĉi-okaze ni konsideris la reagotempon, ĉe kiu oni antaŭscias, kiu signalo ekaperos, la reago estis antaŭe preparita kaj ellernita kaj ĝi estis simpla. Ĉu tio estas plenumita en reala batalo? Plej verŝajne ne, ĉar la kontraŭlo havas preskaŭ ĉiam pli da eblecoj por ataki. Se povas aperi kelkaj diversaj signaloj, laŭ kiuj oni reagu (per diversaj agoj), oni parolas pri la reagotempo kun elekto. Ĝi estas rimarkinde pli longa ol ĉe la simpla reagotempo. Ĉu tio signifas, ke ne eblas eviti per reagado rektmanfrapon aŭ alian frapon? Se oni komencus vanigi la frapon post ekapero de frap-movo je atingopovo de la brako, tio pravus. Malgraŭ tio ni vidas, ke boksistoj senefikigis rapidan atakon fare de kontraŭlo k.t.p. Kiel klarigi tiun ĉi sperton kaj la menciitan malakordon inter la daŭro de la reagotempo kun elekto, kune kun la daŭro de defendago unuflanke, kaj la daŭro de rapidaj batalagoj duaflanke? Estas unu sola ebleco, kiel solvi tiun ĉi paradokson: la defendanto iam reagas laŭ io alia ol laŭ la striktasenca atako, do laŭ io, kio ĝin antaŭiras. Kio tio povas esti, ni eksplikos en la sekvanta ĉapitro.

1.9. Laŭ kio oni povas reagi?

Por ke la frapo estu sufiĉe peza aŭ ajna alia batalago kontentige forta, la atakanto devas komenci la atakon el oportuna pozicio. Li do ne povas ŝtari arbitre. Plue, li devas situi en ĝusta distanco for de la kontraŭulo. La ĵus menciitaj sinpreparoj antaŭ atako estas identigeblaj de ĉiu sen longa lernado. El ili estas - en iuj limoj - anticipeble, kion verŝajne faros la kontraŭulo aŭ kion li fari ne povas. Tamen tio ne sufiĉas. Estas ankaŭ necese ekscii, en kiuj direktoj kaj ritmo estos la kontraŭulo atakanta. Tion oni el la reciprokaj pozicio kaj distanco de la batalantoj anticipi ne povas. Se la defendanto intencas reagi laŭ iu el eblaj agoj fare de la kontraŭulo, ekzemple per iu defend-ago (kaj pri tio klopodis majstroj de la klasikaj batalartoj), li devas identigi ĝustatempe la estontan agadon fare de la kontraŭulo. Laŭ kio oni povas reagi? Rimarku, kiel estiĝas la moviĝo de la homo. Antaŭ ĉio, la cerbo sendas impulsojn en la respektivajn muskolojn. Sekve de tio ĉi tie plialtiĝas la tonuso, la muskoloj streĉiĝas kaj fine komenciĝas la moviĝo. Sed tio ne estas ĉio. Eĉ se oni imagas aŭ ekintencas fari iun movon, el la cerbo ankaŭ estas elsendataj impulsoj en muskolojn, kaj la tonuso plialtiĝas antaŭ ĉio ĉe tiuj, kiuj partoprenu aŭ efektivigu la movon. Antaŭ la striktasenca batalago oni iufoje observas eĉ aludojn pri la sekvantaj movoj. La similo estas rimarkebla ankaŭ ekzemple sur spektantoj en kinejoj, kiuj rigardas interesan filmon, ĉe kiu ili enspense kunludas, dum diversaj sportaj matĉoj k.t.p. En tiuj ĉi okazoj aperas pli malpli intensaj aludoj pri la movoj, kiujn la homo travivas en sia menso, la t.n. ideomotoraj movoj. Okaze, ke la atakanto devas en batalo translokigi, antaŭ la propra atako, al la kontraŭulo, ĉiam aperas ideomotoraj movoj, memkomprene ne egalforte kaj "legeble". Tial la defendanto havas por reagi pli multe da tempo, ol ŝajnas laŭ la simpla komparo de reagotempo kun daŭro de izolitaj batalagoj, t.e. la agoj sen akompano de la ideomotoraj movoj. La reago (plejparte subkonscia) laŭ la ideomotoraj movoj estis la bazo de la reagado en la t.n. klasikaj batalkompleksoj (la ĵuĵuo, aikido, karateo, kendo k.t.p.); ĉi tiu problemo estis solvata ĉe kreado de la t.n. monosignala sindefendo (vidu pli sube). Rilate tion, ke la defendanto identigas la venon-

POREKTO estas pozicio de frapanta membro aŭ armilo, oportuna por konkerna frapan (15) (ĉ: napřah).

-I meti frapantan membron aŭ armilon en pozicion oportunan por frapi (ĉ: napřahovat).

-ADO estas ago de tiu, kiu -AS (ĉ: napřahování).

HUMERO estas en tiu ĉi libro uzata en la senco "parto de la supra membro inter la ŝultro kaj la kubuto"; ĝi do anstataŭas la terminon BRAKO laŭ (22) (=PIV) sub 2 (p.122). Ni neniam uzas la vorton HUMERO kiel la nomon de la osto, kiu trapasas tiun ĉi parton de la supra membro de homo. La terminon BRAKO ni uzas ĉiam sole en la senco "supra membro de homo"; do laŭ (22) sub 1 (p.122). La supra membro de homo = BRAKO; ĝi konsistas el la mano, antaŭbrako kaj la HUMERO.

tenton de la leganto, rompanta la belecon kaj efikon de la frazo. Sed pluvorta tradukado estas neniam honto, ĉar tion faras ĉiu lingvo, eĉ tradukante el Esperanto. Necesas atenti alian problemon. Kurtaĵaj esprimoj de la originalo estas malpli okulfrapaj kaj tial ili povas kelkfoje ripetigi, dum la pli longaj frazeroj en la traduko ĉe la sama ripetado netolereble atencas la okulojn kaj orelojn. Ekzemple "estas" havas en la naciaj lingvoj kutime unusilaban formon, ĝia ripetado ne estas tiom gena kiel en Esperanto. Bona tradukisto de tempo al tempo evitas ĝin /estas eble = eblas, li estas dekjara = li havas dek jarojn/. Tamen ekzistas okazoj, kiam la ripetado de la sama esprimo estas bezonata por emfazi la efikon. Alikaze malpli longa esprimo povas malakcentigi bildigon. La tradukisto bezonas posedi bonan senton por tiaj nuancigoj kaj profunde koni la stilaĵajn diferencojn inter la du lingvoj.

5. Misinklinoj de la tradukantoj

Retradukinte tradukon en la originalan lingvon kaj komparante la tekston kun la originalo, oni rimarkas du gravajn tendencojn, kiuj aplikigis dum la tradukaĵo:

a/ La tradukistoj tendencas uzi pli generale konatajn vortojn kun pli larĝa, sed malpli preciza signifo, uzi utilajn sablonojn. Ekzemple "mugado de leonoj" ŝanĝigas al "blekado de leonoj", "ronronado de aŭtomobiloj" al "murmurado aŭ bruado de aŭtomobiloj", "serpentumado de soldatoj" al "zigzaga rampado de soldatoj" ktp. La esprimoj uzitaj de la originale aŭtoro estas pli trafaj, pli koloraj, pli reliefaj kaj impresaj. Kiam la tradukisto rimarkas, ke la aŭtoro intence uzis emocie fortajn esprimojn, li male inklinas troigi la emocian forton. Anstataŭ "granda amaso da mono" li tradukas "grandega amaso da mono", anstataŭ "Jocĵo gapis" aperas en la traduko "Jocĵo gapacis" k.s. La pliintensigo kaj malintensigo de la emociaj esprimoj estas tradukmetodaj eraroj kaj la tradukantoj devas gardi sin kontraŭ ili.

b/ La tradukistoj tendencas "klarigi" la tekston, fari ĝin pli logika ol en la originalo. Sed la aŭtoroj ofte intence formulas siajn frazojn malklare por elvoki strecan atmosferon /detektivaĵaj kaj psikologiaj romanoj/ aŭ saĝne nelogike, ĉar tio donas al la teksto novan, pli impresan bildon. En la frazo "mi estis kaptita, poste ili kuris tra la koridoro kaj fine ĵetis min en ian kagon" la verkisto montras sian senpovon dirante "poste ili kuris tra la koridoro" anstataŭ diri "poste ni kuris tra la koridoro", kvankam estas klare, ke li kuris kun ili. Tradukisto, kiu anstataŭ "ili" skribus "ni", farus la frazon pli logika, sed malpli impresa. Tiaj "pliologikigoj" estas en tradukoj tre oftaj. Multaj tradukantoj inklinas al pli ofte uzo de konjunkcioj, por ke la teksto estu "pli flua". La aŭtoro intence evitis ilin por akiri certan efikon /Li alkuris. Li sidigas. Li diris nenion./, sed la tradukinto rompis la bildon per aldono de konjunkcioj /Li alkuris. Kaj li sidigis. Kaj li diris nenion./.

Tamen en multaj situacioj la klarigoj taŭgas. Estas konsilinde skribi "la rivero Ŝázava, la vilaĝo Křenovice, la komunista ĵurnalo Rovnost", ĉar la nomoj Ŝázava, Křenovice aŭ

Rovnost per si mem dirus nenion al la eksterlanda leganto.

6. La tradukmetodo

La tradukisto antaŭ la komenco de laboro devas bone prepari sin. Li bezonas unue akiri kvalitan eldonon de la tradukota libro /se eble, la t.n. kritikan eldonon/ kaj tre atente tralegi ĝin. Unue kiel simpla leganto lasante sin impresi per poeziaj bildoj, due kiel tradukonto, bone atentante la esprimrimedojn de la aŭtoro, substrekante per kraĵono interesajn kaj problemajn lokojn. La tradukisto devas bone pripensi, kia estas la ideo celo de la verko, kion la aŭtoro intencis komuniki al la legantoj. Estas bone koni ankaŭ la ceteran verkeron de la aŭtoro kaj lian biografion, scii en kia tempo kaj por kia celo li verkis ĝin. Poste necesas tre zorge analizi la esprimilojn de la aŭtoro, lian bildigan metodon kaj provi serĉi adekvatajn rimedojn en la traduklingvo. Se iu kvalito de la originala lingvo estas netradukebla, la tradukisto serĉas taŭgan kompenson, per kiu li almenaŭ parte anstataŭigas la netradukeblan trajton de la originalo. Ekzemple d-ro Tomáš Pumpr en sia traduko de Bapto de caro Vladimír uzis internajn rimojn /kaj tuj poste ĉevalvoste; frue jam ĝi volas mangi; false saĝnes, ke mi gajnas/, kiuj ne troviĝas en la ĉeĥa originalo de Havlíček, por kompensi netradukeblajn dialektajn, slangejojn kaj karesvortojn, kiuj spicas la ĉeĥan tekston. La tradukonto devas decidi, kiamaniere li tradukos dialektojn, arkaismojn, vortludojn, proprajn nomojn, proverbojn, idiotismojn, koncize dirite li bezonas krei sian "tradukŝlosilon". Foste li povas eklabori, serĉante taŭgajn esprimojn por ĉiu bildo kaj klopodante, ke li priskribu ĝin nek malpli nek pli intense, klare aŭ emocie ol estas necese laŭ la intencoj de la aŭtoro.

7. Ankorau kelkaj notoj

a/ Tradukante teatraĵon la tradukisto ne devas forgesi, ke la verko estas destinita por esti prezentata sur la scenejo de teatro. Tial ĉiuj frazoj devas esti facile prononceblaj kaj ankaŭ facile kompreneblaj, ĉar la spektanto ne havas eblon legi "rimarkigojn de la tradukinto" kiel en libro. La teatraĵo povas esti aktualigita tiel, por ke ĉiuj aludoj kaj mencioj estu kompreneblaj por la aŭskultantoj. Se en la teksto estas aludo pri iu ne plu konata komponisto, estas konsilinde anstataŭigi lin per alia, pli fama muzikisto, alie la sursceneja konversacio estas por la spektantoj nekomprenebla.

b/ La proprajn nomojn familiajn oni povas traduki nur tiam, kiam la medio de la verko ne troviĝas en konkreta lando. Ekzemple la medio de Insulo de Pingvenoj far Anatole France troviĝas sur nekonata insulo. Konservu la francajn nomojn de la originalo signifus transporti la scenejon de la rakontado el la nekonata insulo en Francion kaj fari el la verko satiron nur pri Francio, dum la tradukitaj nomoj donas al la verko validecon por la tuta homaro. Se oni tradukus la komikajn nomojn en la romano de Dickens pri sinjoro Fickwiĉ, la romano estus kvezaŭ forportita el Anglio, kie okazas ĝiaj eventoj, la verko perdus sian pure englan karakteron, kiun ĝi devas havi. Tial la nomojn en ĉi tiu romano ne eblas traduki. La personajn nomojn /Petro, Paulo, Elizabeta, Maria/ oni ordinare tradukas, ĉefe en la porinfanaj verkoj, la alnomojn necesas traduki ciam. En la Trezor-insulo far Stevenson la nomon de

pirato Long John Silver /laŭvorte: Longa Johano Arĝento/ la ĉeĥaj tradukistoj tradukis en la eldono por plenkreskuloj Longa John Silver, en la eldono por geknaboj Longa Johano Silver, ĉar Longa estas alnomo de la pirato ricevita de kamaradoj, dum "Silver" estas lia angla familia nomo. Se la nomo ne estas tiel mondfama kiel Pickwick, Silver, Don Quiote k.s., eblas traduki ĝin donante al ĝi aspekton de la originela lingvo /komperu: sinjoro Skarabo - sinjoro Skarabov - sinjoro Skarabeŭski - sinjoro Skarabeček - sinjoro Scarabeau - sinjoro Scarebini ktp./ . Tiun artifikon uzas tradukantoj de bonhumoraj verkoj.

c/ La dialektojn aperintajn en la originalo ne eblas simple traduki per la dialektoj de la traduklingvo. Se la sudfrancan dialekton oni tradukus en la ĉeĥan per la sudbohemia dialekto, la medio de la rakonto estus subkonscie transportita el la suda Francio al la suda Bohemio kaj la verko perdus sian nacian karakteron. En Esperanton oni ne povas traduki tian dialekton per Ido, ĉar tiamaniere la sudfrancoj fariĝus idistoj. Pro la samaj kaŭzoj ne eblas traduki la ukrainan lingvon en ruslingvaj romanoj per Ido aŭ Interlingua /ĉu Interlingua traduku la ukrainan per Esperanto?!/. Necesas serĉi neŭtralajn rimedojn, kiuj nur nuancigas la tekston folklore, sed ne forprenes ĝian nacian karakteron /"Oĉjo, venu niadomen, ni festenos porkobuĉon!" / nek faros la tekston malfacile komprenebla. La samo validas ankaŭ pri arkaisma lingvo.

8. Konkludo

Ĉi tiu artikolo ne elĉerpis la tutan problemaron de tradukado. La aŭtoroj nur intencis montri, ke la tradukado postulas multe pli ol solan regadon de la traduklingvo, pli ol nuran stilistikan talenton. Ili volas instigi la tradukemulojn al diligenta studado de la literaturo pri tradukarto.



LIBROJ, KIUJ NE POVAS MANKI EN BIBLIOTEKO DE KVALIFIKA TRADUKISTO EN LA ĈEĤA

1. Slovník cizích slov. SPN 1981, Praha. Kčs 56,-
2. Slovník synonym a frazeologismů. Novinář 1977, Praha. Kčs 32,-
3. J. Levý: Umění překladu. Panorama 1983, Praha. Kčs 23,-
4. Slovník české frazeologie a idiomatiky. Přirovnání. Akademie Praha, 1983. Kčs 98,-
5. J. Zaorálek: Lidová rčení. Akademie 1963, Praha. Kčs 49,50
6. Český slovník věcný a synonymický 1 - 3. SPN 1963-1977. Kčs 263,-.

Sen tiuj ĉi libroj vi restos ĉiam nur amatoro en la arto traduka. Tradukado estas arto kaj ne nur metio. Kaj arto postulas konojn. Kiu ne perfekte majstras la problemojn de la tradukarto en la lingvo ĉeĥa, ne povas esti majstra tradukisto en Esperanto. Kredu al specialistoj.

J. Karen

lingva angulo

Bernard Golden

Kontribuaĵo al la erartabelo de FIV

La dua eldono de Plena Ilustrita Vortaro /PIV - 1977/ enhavas kvarpagan erartabelon, sed tiu ĉi ne estas kompleta. Dum jardeko da uzado mi malkovris pli da misaĵoj, kiuj bezonas gustigon. Jen kelkaj aldonaĵoj al la erartabelo de la nuna eldono.

Komposteraroj kiel la sekvaj saltas al la okuloj; rulado /pg. 945/ ne estas "kuka pasto", sed kuka pasto; polipo /pg. 845/ ne estas "celerentulo", sed celenterulo. Kelkaj vortoj montras heziton rilate la uzon de "s" kaj "z". Sur pg. 347 estas informo, ke glosino estas insekto, kiu transportas "tripanozomojn". Tiu ĉi vorto estas ĝuste registrita kiel "tripanosomoj" sur pg. 1136. Same, ĉe la difino de agavo sur pg. 14-15 estas resendo al "sizo", kiu ne ekzistas kiel kapvorto; oni trovas nur "sisalo" sur pg. 996. Kiam du formoj de la sama vorto estas registritaj, ne estas eble scii, kiu estas la gusta. Agavovino estas nomata pulko sur pg. 15, sed sur pg. 886 agava brando /ĉiele!/ estas pulkvo. Sinonimo de "teramaso" estas "tumuluso" /pg. 38/, sed oni vane serĉas ĝin en la vortaro, ĉar nur "tumulo" estas registrite /pg. 1145/.

Inter la eraroj estas ankaŭ pekoj kontraŭ la gramatiko. Meĉujo estas difinita kiel "malgranda ujo, kun oleo, en kiu trempas meĉo...." /pg. 678/. Ĉar la verbo "trempi" estas transitiva en Esperanto, estas neĉe uzi netransitivan formon en la difino: ".... en kiu trempigas meĉo".

FIV donas ankaŭ erarajn geografiajn informojn. La urbo Sidnejo ne estas en Suda Nov-Kimrujo /pg. 985/, sed en Nova Sud-Kimrujo /pg. 509/. Kelkfoje grava loknomo estas menciita en unu el la artikoloj, ekzemple "mortadelo el Bolonjo" /pg. 714/, sed ĝi ne aperas en la vortaro kiel kapvorto. Daco /pg. 163/ ne estis ano de slava gento; li apartenis al gento havanta parencecon kun la trakoj /pg. 1123/. PIV diferencigas la antikvajn tracojn disde la nuntempaj trakoj /pg. 1126/, sed ne la macedonojn de la paŝinteco /pg. 657/ disde la hodiaŭaj makedonoj el Jugoslavio. La boŝmanoĵ /pg. 120/ ne estas nigra popolo; antropologoj klasifikas ilin kiel apartan rasen grupon, do la epiteto "nigra" estas malgusta. Ankaŭ difinoj de lingvoj estas reviziendaj. Ekzemple, la jida lingvo /pg. 452/ ne estas "germana dialekto", sed plene evoluinta, memstara lingvo de la germana branĉo. La svahilo /pg. 1053/ ne nur estas la "oficiala lingvo de Tanzenio, sed la intergenta lingvo de plurej orientafrikaj landoj, kaj ĝi devas esti nomata suahila.

KONVERSACIO por progresintoj



Oka temo: S P O R T O K A J L U D O J

Sporto estas korpa ekzerco aŭ ludo, kiu celas la disvolvon de fizika lerteco, hardas la korpon, amuzas kaj elvokas vetadon. Oni praktikas sportojn sur sportkampoj, en gimnastikejoj, basenoj, salonoj aŭ en naturo. La gimnastikejo estas ekipita per diversaj gimnastikiloj. Paraleloj estas horizontalaj stangoj, gimnastikanto povas stari inter ili kaj gimnastiki per manoj sur ili. Reko estas unu stango inter du kolonoj. Trapezo estas stango sur ŝnuroj. Haltero estas du pezaj globoj kunigita per stango, kiujn oni levas. Trebo estas surpaŝata aŭ transsaltata, stablon aŭ cevalon oni transaŭ sursaltas. Eskalo estas ekipaĵo por vertikala suprenirado. En kelkaj gimnastikejoj estas grimpiloj, rondturniloj, matracoj kaj aliaj gimnastikiloj.

Kelkajn sportojn oni povas praktiki nur somere, aliajn nur vintrre, aliajn ĉiusezone. Kelkaj sportoj estas praktikataj nur en teamoj, tio estas samnombraj tacmentoj. Ofte ludas du teamoj kontraŭ si per pilko, ĵetbulo aŭ ĵetpeco. La pilko estas globo el ledo aŭ gumo, la ceteraj havas aliajn formojn. Ili estas diverse grandaj kaj el diversaj materialoj.

Futbalo aŭ piedpilko estas ludo, kiam ludantoj puŝas pilkon nur per piedo, kruro aŭ kapo kaj strebas lokigi ĝin en la golejo de alia teamo. Tiu golejo estas ortangulo el tri traboj, la kvara latero estas tero. En handbalo aŭ manpilko teamoj povas puŝi pilkon nur per manoj aŭ brakoj. Foloo aŭ akvopilko estas analogie ludata en akvo, hokeo sur ĝero aŭ glacio, ĵetbulo aŭ -peco estas puŝata per bastonoj. En ŝugbeo oni povas tuŝi pilkon, kiu estas bula, diversemaniere. Ekzistas ankaŭ biciklo- kaj cevalpilko. En basketbalo, netbalo aŭ korbopilko estas anstataŭ golejo senfunda korbo, kien oni strebas meti aŭ enĵeti pilkon. Dum volejbalo aŭ retpilko estas inter teamoj reto, super kiu oni ĵetas aŭ puŝas pilkon per manoj laŭ certaj reguloj. Misoj kontraŭ reguloj estas poentoj de kontraŭuloj. Teamoj de diversaj ludoj estas diverse nombraj, ĉefe devas esti samaj kondiĉoj por ambaŭ teamoj. Matĉo estas luklado de du teamoj, ĝi daŭras dum certa tempo aŭ ĝis certa rezulto. Oni ĝin ĵugas laŭ reguloj.

Kelkajn sportojn oni povas praktiki nur du- aŭ kvarope. En teniso havas ludantoj rakedojn en manoj kaj puŝas pilkon super reto. Simila estas tabloteniso aŭ ping-pongo. Badmintono estas ludo kun plumpilko. En manbatalo strebas kuŝigi unu la alian. En bokso havas kontraŭuloj specialajn gantojn kaj frepas per ili. Skermo estas batalo kun sabro aŭ glavo. Ĵudo estas manbatalo, kiam oni eluzas diversajn ekkaptojn. Duelo ne estas plu sporto, sed regula batalo inter du kontraŭuloj, iam ĝis morto. Ŝako estas interesa ludo kun fi-

guretoj, kiuj estas movataj sur ŝaktabuloj. Tabulaj ludoj estas pluraj, ŝako estas plej komplika, oni povas noti unuopajn luderojn. Ŝakaj figuroj estas: reĝo, reĝino aŭ damo, turo, kavaliro aŭ ĉevalo, fuziliero, peono.

Atletiko estas sumo de sportoj, kiujn oni povas praktiki unuope. Estas saltado, kurado, biciklado, gimnastikado, naĝado, velnavigado, remado, glisado, padelado, pafaĉo kaj aliaj. Oni naĝas en akvo per forto de siaj brakoj, remas aŭ padelas en boato. Glisi oni povas sur akvo aŭ en aero. Oni pafas per pafarko, en kiu oni ĵetas sagojn, aŭ per pafilo. Oni havas aŭ specialajn celtabulojn kaj pafcelojn aŭ oni pafas por mortigi bestojn kaj birdojn. Tiujn oni casas. Al la atletiko apartenas ankaŭ diversaj ĵetadoj aŭ lanĉadoj per disko, globo, lanco aŭ aliaj objektoj. Oni mezuras la atingitan distancon. En atletiko oni levas halterojn kaj aliajn objektojn. En turismo pasas turistoj aŭ veturas en transportiloj por rigardi kaj viziti vidindaĵojn de pejzaĝo: kastelojn, ruinojn, kalkŝtonajn grotajn kun stalagmitoj kaj stalaktitoj, valbaraĵojn, rezervitajn teritoriojn, muzeojn, palacojn kaj aliajn monumentajn konstruaĵojn. Turistoj certigas siajn vojdirektojn laŭ landkarto aŭ kompasoj kaj busolo. En montaroj oni supreniras pintojn de montoj kaj rokoj. Se oni eĉ grimpas per ŝnuro, oni estas montgrimpisto aŭ alpisto. Turistoj portas necesajn objektojn en dorso- aŭ flanksakoj, kampadas kaj tendumas.

En ĉambroj oni povas praktiki diversajn ludojn sur tabuloj, ĵeti kubeton kaj movi entaŭen figurojn laŭ ĵetoj. En kelkaj ludoj decidas nur hazardo, en aliaj ankaŭ sprito. Ludkartoj havas diversajn bildojn kaj validas diverse. Oni povas per pli granda valido atuti. Puŝado de globoj sur verde kovrita tablo estas bilardo. Kegloj estas lignaj figuroj, kiujn oni feligas per peza globo ĵetata sur keglejo.

Vintre oni povas sledi aŭ glitveturi, skii sur neĝo, glitkuri sur glacio. Sur sledo oni sidas, sur glitkuriloj kaj skioj oni staras. Ekzistas ankaŭ rulkuriloj kun radoj, kiuj taugas por glata grundoj.

En ĉiuj sportoj estas aranĝataj turniroj kaj ĉampionecoj. Turniro estas organizo de pluraj matĉoj, por ke oni decida primarecon de teamoj. Ĉampioneco estas organizo de sportoj por unuopuloj por trovi ĉampionon. Konkurso estas plej diversa mezurado de konoj, spertoj kaj lertoj ĉe unuopuloj. Konkuro estas konkurso en kelkaj sportoj. Praktike oni sportas en kluboj kaj asocioj. Multaj estas nur spektantoj kaj favoruloj. Ili vetas pri rezultoj aŭ lotmetas. Ekzistas sportloto pri rezultoj kaj loterio, en kiu oni kolektas monon de multaj kaj alĵugas ĝajnojn al malmultaj, kiuj estas hazarde elektitaj. Tombole estas loterio kun objektoj kaj premioj. Dum festoj kaj foiroj estas karuseloj, kie oni rotacias, kaj balanciloj, kie oni ŝvebas supren kaj malsupren. En tobogano oni supreniras turon kaj glitas malsupren en speciala trogo. En pefoj oni provas sian kapablon. Aliaj amuziloj eluzas la plej modernan teknikon. Ekzemple ekzistas pli modernaj ŝvebiloj kaj glisiloj, rulbretoj, konkuraj ĉaroj, perfektaj sledoj, skioj kaj aliaj sportiloj.

Ĉiu homo havas siajn hobiajn, kiujn oni praktikas en libera tempo. Kelkaj homoj ŝanĝas nur specon de laboro. Multaj sportoj es-

tas utilaj dum diversaj akcidentoj, karamboloj kaj katastrofoj. En kazo de aviadila katastrofo la homo forlasas la aviadilon per parasuto, paraŝutismo estas eĉ sporto. Homoj estas ludemaj kaj eltrovemaĵ, elpensas novajn kaj kuriozajn sportojn kaj vetojn.

GRAMATIKO: 1 Nomu rezultojn de kelkaj matĉoj kaj skribu numerojn per vortoj 2 Trovu substantivojn kun diversaj sufiksoj kaj klarigu ilin 3 Trovu substantivojn kun sufikso -ejo kaj anstataŭigu ilin per aliaj substantivoj 4 En parto de la temo uzu aliajn verbojn, sed lasu la sencion

STILO: 1 Skribu regularon de iu sporto, turniro aŭ ĉampioneco 2 Skribu pri la graveco de sporto por homo 3 Skribu dialogon inter sportanto kaj malamiko de sporto

DEMANDOJ: 1 Kiujn sportojn vi praktikas? 2 Ĉu vi lotmetas? Ĉu vi jam gajnis? 3 Ĉu vi aŭdis pri vetemo de kelkaj fanatikuloj? Skribu ridindajn kazojn 4 Kiujn eksterlandajn prospektojn vi ricevis? 5 Kiun hobion vi havas? kion vi kolektas? 6 En kiuj Esperantaj gazetoj oni skribas pri sporto? 7 En kiuj libroj vi legis pri dueloj? Ĉu vi legis tiujn librojn en Esperanto? 8 kiuj sportoj estas plej multekostaj? 9 Nomu plej glo-rejn sportulojn de via nacio aŭ ŝtato 10 Kia estas signifo de Esperanto por sporto? Josef Chvosta

TABUAJ TEMOJ KAJ VORTOJ

"Dio metis en nian animon sanktecan senton, ke kelkaj partoj de nia korpo estu ĉiam kovritaj", tiel komencas la katolika kateĥismo sian klarigadon pri la sesa ordono de dio. Sed la vorto "tabuo" ne devenas el la katolika religio, ĝi estas ie el Polinezio. Laŭ la "plena vortaro": tabuo: ĉe primitivuloj, religieca institucio, kiu igas netuŝeblaj iujn personojn aŭ objektojn aŭ nefareblaj tiujn agojn. Tabua: netuŝebla aŭ malpermesata pro tabuo.

El tio sekvas pro la kontakto de homoj, ke kelkaj temoj estas tabuaj. Sed tiu tabuo ŝanĝiĝis en la historio. Nia socio heredis la kristanan tradicion, kiu mem transportis tradicion judan, grekan kaj romian, sed ne komplete kaj perfekte. En aliaj tradicioj ekzistas aliaj tabuoj, kompreneble la tradicioj ne havas inter akrajn limojn, sed estas reciproke influataj. Eĉ se oni nuntempe ne aliĝas al religieca senco de la kristana tradicio, tamen la cetera influo restis ĝis nun. Sed ĉiam ekzistas homoj, kiuj "pekis" kontraŭ tabuoj kaj tiel kondukis la ceterajn al indigno kaj kolero. Sed oni ne povas konsekvence obei la tabuon. Kontraŭe estas aliaj motivoj: medicinaj, pedagogiaj kaj juraj. Do eĉ se ekzistas tabuo, estis certaj homoj, kiuj tamen okupis sin per certa tabuo kaj estis por aliaj jen hipokrituloj, jen krimuloj, en malpli granda skalo helpantoj kaj konsilantoj.

Unu tabuo, kiu akompanas la kristanan tradicion, estas tabuo pri seksej aferoj. La vortoj de kateĥismo volas instrui, ke ne temas nur pri kristana tradicio, sed pri tuthistoria. Sed la trovoj

de desegnaĵoj sur grekaj uĵoj aŭ skulptaĵoj en hindaj temploj montras, ke la tabuon pri seksaj aferoj fiksas la kristana tradicio, eĉ se ne konsekvenca. Ĉar estas necese iam trakti pri tiuj aferoj kaj agi, do ekzistas eĉ en la biblio pluraj linioj, kiuj povas aliajn indignigi, ja skandaligi. Nome pri seksaj aferoj oni povas paroli science, populare, intime aŭ frivole. La kristana tradicio allasis nur intiman paroladon, pli multe en simboloj ol publike. La science traktado estis destinita nur por malmultaj homoj, cetera la eklezio longe ne allasis sekcadon, la populara parolado longe ne ekzistis, sed inter normalaj homoj disvastiĝis parolado frivola, kiam poste estis pli granda ebleco skribi, post invento de presado, do oni longe ne permesis presi ion frivolan. Se tio tamen aperis, do oni parolis pri pornografio. Tamen kiel la klerigo disvestigis, do oni ne povis longe silenti pri diversaj temoj. Tio malpli pri seksaj aferoj, ĉar tiuj ja estas gravaj por la tuta socio. Ne sufiĉis nur instruado de medicinistoj, pedagogoj, akuzistoj, pastroj ktp., ĉiuj homoj devis scii pri seksaj aferoj, alie ili serĉus instruon el tiuj frivolaj kaj pornografiaj paroladoj. Kompreneble ĉiam aperis homoj, kiuj iel liveris la instruon eĉ per tiu frivola formo.

Nuntempe oni konsciigas, ke ĉiu homo bezonas ian instruon pri seksaj aferoj, por forigi malseriozecon kaj senrespondecon. Tial oni enkondukas la edukadon al "geedzeco kaj gepatreco" eĉ en lernejoj. Oni permesas paroli malfermitaj pri la seksaj aferoj kaj malrespekti tiel la tabuon. Kompreneble ĉar la scienca kaj frivola pritraktado ekzistas longe apud si, unu ne konis la alian, do ili konsiderinde diferencigis, ekzistas entute da sufiĉe diferencaj terminologioj. La terminoj sciencaj estis anstataŭitaj per terminoj, kiujn oni nomas: vulgaraĵ, maldecaĵ, lascivaĵ kaj kiuj entute ne aperis en presa teksto, dum en parolado ili estis sufiĉe oftaj. Kompreneble kelkaj verkistoj sukcesis uzi eĉ vulgaraĵn terminojn, sed la cenzuro longe ne allasis tion, la vortoj estis punktitaj. Nur en nuna tempo oni allasas ilin sen punktoj. Kompreneble ne ĉiuj konsentas kun malrespektado de tabuo.

Esperanto oni volas prezenti al Esperantistoj kiel lingvon por ĉiutage uzado en ĉiuj sferoj de la homa vivo. El tio ja sekvas, ke nepre oni povas paroli Esperante ankaŭ pri seksaj aferoj. Se la seksaj aferoj ne estas plu tabuo por multaj homoj, do kiel ne ankaŭ por Esperantistoj? Do la malfermado de okuloj, ke oni parolas pri seksaj aferoj, ŝajnas esti hipokriteco, ĉar tiuj aferoj ekzistas kaj estas egele, ĉu Esperantistoj pri ili parolas aŭ ne. Alia afero estas, ĉu uzi en Esperanto ankaŭ vulgaraĵn vortojn, kiuj tamen estas ĝis nun pli eble nur parolataj. Ekzemple, se oni parolas pri koitado, do tio estas tute normale. Sed en vulgara parolado oni ne uzas tiun vorton. Sed se oni volas rakonti vulgaran anekdoton en Esperanto, do en tiu kazo la verbo "koiti" ne taŭgas. Iu uzis do "koitaĉi". Sed tio ne estas senco de tiu sufikso. Au oni devas uzi "gustan vulgaran Esperantan terminon", aŭ oni rezignu pri la rakontado, se tio ne estas ebla per normalaj neŭtralej vortoj. Tial kelkaj Esperantistoj proponas eĉ enkonduki "vulgaran terminologion" en Esperanto. Kompreneble tiu terminologio ne estas destinita por publika kurso. Krome oni pripensu, ke rilato al vulgaraĵ vortoj ne estas en ĉiuj lingvoj la sama. En FRG aperis

antaŭ nelonge slogeno "Bumsen, nicht Bomben". Kaj "Bumsen" estas ĝuste vulgara vorto por "koiti", kiun ankaŭ ĉefa lingvo havas. Kaj en filmoj kaj libroj jam longe aperas nekonvenaj vortoj, eĉ se antaŭ 30 jaroj oni povis legi nur: "Do pr...."

Se io estas tabuo, ĝi tamen ekzistas. Mi persone faris en Esperanto tabuon pri armea terminologio. Mi nenie instruis, kiel esprimi en Esperanto: pluk, poruĉik, minomet, kulomet, ĉetaŭ, rota ktp. Mi lasas nur: soldato, armeo, oficiro, pafilo, eble nemultaj aliaj. Sed el tio ne sekvas, ke eble alia Esperantisto ne bezonas tiujn vortojn. Cetere foje aperis informo, ke usona armeo uzas Esperanton kiel lingvon de "malamiko", do minimume tiu bezonas terminojn laŭ mi tabuajn.

La rilato de aliaj tradicioj al seksaj aferoj ne estas tiel tabua kiel en la kristana tradicio. Sed en tiuj tradicioj estas ree aliaj tabuoj, pri kiuj mi nur miras. Nuna tempo forigas multajn tabuojn, kompreneble ne ĉiuj konsentas.

Se oni en la temo "Familio" parolas pri koito, koncipado, gravedeco, embrio, skuŝo, adultado, nasko ktp., do tio nepre apartenas en la temon kaj estus hipokriteco preterlasi tion, kvazaŭ tio ne ekzistus. Cetere eĉ en Esperanto aperis libro ABZ pri amo, kie estas ne nur tiuj terminoj, sed ankoraŭ multaj aliaj. Kompreneble gvidi konversacion en tiu senco ne estas facile afero, sed temas nur pri nekutimo, ĉar tiuj temoj estis tabuaj. Sed kiel ni miras pri etikedo de hispana kortego, kiam "hispanaj nobelinoj ne havis krurojn" aŭ pri etikedo de brita kortego sub virga reĝino Virginie, tiel estonte miros niaj posteuloj, ke ni estis en embaraso, kiam ni en lernejo instruis kaj edukis al "geedzeco kaj gepatreco".

Josef Chvosta

Rimarko de la redakcio: En la unua temo de la konversacio por progresintoj "Familio kaj kolektivo" en la 112-a n-ro de Starto troviĝas malagraba eraro: sur la 12-a linio de sube estis erare skribite "Ili kontentiĝas korpe..." anstataŭ la ĝusta "Ili kontaktiĝas korpe...". Mi petas pardonon de la aŭtoro kaj de la legantoj.

La redakcio

ČESKÉ BUDĚJOVICE. Výstava "ESPERANTO - NÁSTROJ MÍRU" v jihočeské metropoli, která byla zahájena slavnostní vernisáží začátkem ledna tohoto roku v moderním a důstojném prostředí Muzea revolučního dělnického hnutí se stala důležitým úspěchem v šedesáti letech existence pořádajícího klubu "La Progreso". Dva sály, které byly k dispozici, se podařilo zaplnit vysoce zajímavým esperantským materiálem, počínaje historickými dokumenty, starou korespondencí mezi samideány po celém světě až po velmi ilustrativní ukázky nynějšího rozšíření esperanta. Myšlenka míru a samotný motiv, který propagoval možnost a používání této mezinárodní plánované řeči jako účinného, mírového prostředku, se objevovala důsledně ve scénáři. Na své si přišli i všichni sběratelé, filatelisté a filokartisté, neboť zde našli zajímavé "pozdřavý dálek".

Jen podle podpisů a zápisů ve výstavní knize navštívilo tuto významnou událost více než tisíc lidí - nejen žáci základních, středních a odborných škol, ale i různé podniky, organizace, brigády socialistické práce, pionýři... Však také pořadatelé věnovali maximální pozornost propagaci. Plakáty s emblémem výstavy a zároveň "La Progreso", který vytvořila akad. malířka Dana Pucharová, bylo vidět všude.

V tomto roce jubilejícího esperanta, v kterém oslaví též klub "La Progre-

so" ŝedesát let od svého založení, chystají jeho členové další významné akce. V nejbližší době vydají pamětní medaili a "Tradiční jarní setkání" chystají s velkou péčí. O konkrétních přípravách aktuálně informuje bulletin "Sudbohemia esperantisto", stále více článků zařazuje deník Jihočeská pravda, kde v sobotním vydání mají pravidelnou rubriku i esperantisté. Emil Egner, redaktor "Sudbohemia esperantisto"

HAVÍŘOV. La loka grupo aranĝis jarkunvenon en januaro kaj la komitato restis sen ŝango. En februaro daŭrigis Jarmila Pastrňáková serion de siaj paroladoj kun diablidoj pri vojago en Egiptio, kaj en marto okazis festo de la internacia virina tago. M. Pastrňák paroladis pri rilato de Zamenhof al liaj patrino, edzino kaj du filinoj. Sekvis malgranda regalo kaj kantado de Esperanta kaj ĉeĥaj kantoj kun muziko. A.St.

KARLOVY VARY. MS Karlovy Vary uspořádá X. jubilejní ITREE od 11.9. - 13.9.1987 v rekreační oblasti Boží Dar, okres Jáchymov. Na programu bude turistický výlet, prohlídka provozů lázeňských zařízení, kulturní akce. Zájemci o účast at se obrátí na adresu: Ing. Miloš Bloudek, Karlovy Vary, Vyšehradská ul. 4. PSČ 360 01.

NETOLICE. Raportisto Lubor Faltejsek kaj fotografisto Josef Soumar venis per sia "Volga" por speciale viziti la Klubon de internacia amikeco ce la Urba domo de junplonioj kaj junularo en Netolice. Trideko da infanaj klubanoj lernas tie la internacian lingvon kaj jam praktike ĝin uzas, sub gvido de Jan Řepa.

La rezulto de la vizito estas tripaga raportoĵo (inkluzive la titolpaĝon) pri la studrondo kaj Esperanto kun koloraj fotoj, pripaca desegnaĵo de Pavel Rak kaj titolo "Bonan tagon! Saluton!" kaj ĉefine "Ĝis la revido!" Kaj kun la antaŭavizo: "UNESCO-datreveno: 100 jaroj de Esperanto". Ĉio aperis en la vigle redaktata infana revuo "Pionýr", 5/87.

Noto de la redakcio: Skribu al ni ankaŭ vi pri la aktivecoj de via klubo aŭ rondeto. Kaj skribu esperantlingve!

kroniko



Dne 5. 3. 1987 se dožila a oslavila významné životní jubileum dlouholetá členka esperantského hnutí v Gottwaldově Františka Omelková. Oslavila své 80. výročí narození.

Patřila k jednomu ze zakládajících členek a aktivně pracujících členek v esperantském hnutí v Otrokovicích a Gottwaldově. Spolu se svým manželem patřila k aktivním členům. Pan Omelka se podílel v esperantském hnutí i jako překladatel a v esperantu mu vyšla řada knih.

La 27-an de februaro 1987 mortis s-ano Ludoviko Železný. Li prezentis sin, sidante en la vico de kursanoj aŭtune 1965. Bonége kaj facile li estis progresanta en la scio de la internacia lingvo - li estis ja iama gimnaziano kaj cetere - lia intereso estis direktata al aferoj, kiuj subtenas la vivon, kiuj beligas ĝin pro sinceraj kaj ardaĵaj amikecoj. Li alte taksis la veron kaj la sincerecon, nauzigante hipokritecon. Li preferis efikan kreaĵon laboron, pro tio li forlasis administran postenon akceptinte fizikan okupon de fornegmasonisto. Lia admiro kaj estimo de la naturo estis profunda. Kaj tiu ĉi delikatanima homo, kiu multe konscie subtenis nian ideon, nun subite - nur 65-jara - forpasis. Nia karega amiko, via ĉiam bonhumora ĉesto en niaj kunvenoj mankos tre senteble! Via sincereco kaj spriteco ne plu ornamos niajn amuzajn interbabiladojn kaj diskutojn! Adiaŭ Ludoviko, amiko nia estimata kaj ŝata, neniam ni forgesos vin! Honoron al via nobla animo!

La anaro de ER Havlíčkův Brod.

La 26-an de decembro 1986 mortis s-ano Oldřich Marek en Žamberk.

La 30-an de septembro 1986 mortis s-ano Josef Smutek en Pardubice.



Z výstavy v Českých Budějovicích:

← Vstupní část výstavy s novým emblémem od akad. malíčky Puchnarové.

↑ Částečný pohled do jednoho z výstavních sálů. O pozorné návštěvníky nebyla nouze.



heraldiko _____ _____ veksilologio

Duonigita ĉevalo.

Pasis jam pli ol 700 jaroj, kiam la ĉeĥa militistaro, gvidata de Vladislav II., militiris malproksimen al la sudo, ĝis la lando Itala. La vojo kondukis trans montoj kaj valoj, trans riveroj kaj densaj arbaregoj. Arkevoje ili ĉirkaŭiris Alpoj, por eviti la plej altajn montojn kaj krestojn de tiu ĉi altmontaro, ĝis ili venis en la norditalan ebenejon.

Ŝajnis, ke al celo, la ribelema Milano, ili havas vojon malfermiten.

Sed haltigis ilin la potenca rivero Adiĝo, ĵus elbordiginta. La rivero muĝis timige, kaj sur la levigintaj ondoj flosis rompaĵoj eĉ forportitaj lignaj konstruaĵoj, elradikitaj arboj kaj drorintaj bestoj. La milistaro haltis.

Kavaliro Odolen kaj armilportisto Ješek, membroj de la reĝa sekventaro, ekrajdis laŭlonge de la rivero, ĝis ili trovis neprofundan lokon, kie estis vadejo. Sed nun la skvo estis eĉ ĉi tie leviginta kaj ruligis antaŭen, kvazaŭ ĝin pelus diabloj.

Sed ili ne ektimis kaj kun la ĉevaloj kaj armiloj ili ĵetis sin en la riveron. Akvo atingis ĝis la dorso de la ĉevaloj, sed la pezaj armaĵoj firmigis iliajn pasojn kaj tiel ambaŭ atingis la kontraŭan bordon.

La reĝo kun la armeo observis ilin. Post tempeto da hezitado, altiritej per tiu ĉi ekzemplo, ili sekvis la kuragaĵajn virojn kaj

tiel ili venkis la lastan obstaklon sur la vojo al la ribelema Milano. Kavaliron Odolen reĝo Vladislav II. honoris pro lia brava ago, dum la armilportiston Ješek neniam atentis, kvankam la braveco de ambaŭ estis egala. Odolen estis nobelo, dum Ješek simpla soldato. Sed la okazo de Ješek por eminentiĝi proksimiĝis.

La vojon de Adigo al Milano trairis la ĉeĥa militistaro en rapida ritmo kaj tiel okazis, ke el la armeoj de la imperiestro ĝi venis tien la unua. Estis malfrue vespere, kiam ĝi proksimiĝis al distanco de sesgopafo antaŭ la muregojn.

La regnestro ordonis ektendumi senbrue, Ješek, la ursoforta armilportisto, ekkomprenis tion laŭvorte. Li enbatis la tendokojnetojn en la teron per nuda manplato. Nenie povis aperi fajreto kaj mizeraj lumetoj kaŝiĝis en fermitaj tendoj.

Ješek ekhavis ideon. Dum la tendaro jam longe dormis, li ankoraŭ kun pluaĵ batalantoj kaŝiris el la tendo tra la malfrua nokto ĉe la negardata flanko de la urbo. Sen kaŭzi tumulton, ili akiris multe da valora predo. Ili estis dume tiom tromemfidaĵ, ke en la urba ĉevalejo ili atencis kaj ligis la staliston kaj militkaptis por si ĉevalojn. Ješek elektis por si blankĉevalon. La ĉevalojn ili ŝarĝis per la predo kaj galope ili hastis al la urba pordego.

Sed la ĉevala piedfrapado vekis la gardistojn. Kiam ili ekvidis la rajdantojn kuregantajn al la pordego, ili vokis al la pordeggardisto, ke ili mallevu en la pordego la feran kradon, pezan kiel plumbo kaj akran kiel glavon. Tiam jam ektagiĝis. Ĉiuj jam trarajdis la pordegon kaj la laste, Ješek, kiu havis la plej grandan kaj plej pezen predon, celis al ĝi. Kiam li estis rejdenta tra la pordego, la pordeggardisto dishakis la ĉenon, kiu firmigis la kradon supre, kaj la krado falis kun bruŝo malsupren. Ješek estis ĝuste sub ĝi kaj la akra krado duonigis la ĉevalon.

Oni rakontas, ke la forta Ješek metis sur la sultron la antaŭan duonon de la ĉevalo eĉ kun la predo kaj rapidis al la ĉeĥa kampadejo. La soldatoj kaj la reĝa ŝtabo jam levigis kaj kun mirego ili rigardis Ješekon. Tiu kun la sargo venis en la tendaron kaj la ĉevalduonon kun la predo li metis antaŭ la regnestron. Vladislav II. mirigis pro tia forto kaj kurajo, kiam montris Ješek. Li rekonis la heroan agon kaj rangaltigis lin al kavaliro kaj pridonacis lin per nobela blazono.


En la blazono troviĝas je la memoro de la braveco de Ješek la antaŭa duono de blanka rajdĉevalo en ruga kampo. La ĉevalo havas bridon kaj levas la maldekstran antaŭan kruron.

Ješek kaj liaj kunuloj konetiĝis al la stabo la malfortikan, negarditan lokon de Milano, kiun ili nokte malkovris. Post kiam el Milano venis la imperiestro kun la ceteraj armeoj, okazis obstina batalo, en kiu la milenanoj estiĝis venkitaĵ kaj ilia ribelamo rompiĝis. Pro la eminenta helpo de la ĉeĥa militistaro Vladislav II. ricevis la heredan reĝan kronon.

La brava Ješek revenis en Bohemion en la regionon de Frácheň, kie li ricevis bienojn de la reĝo. El lia gento devenis poste la sinjoroj el Pardubice. Unu el ili, Vilém, kiu vivis en la dua duono de la 14-a jc., subskribadis sin "de Kozi". Tiu fortikaĵo staris malproksime de sidejo de familio Malovec, kiu havis similan blazonon kiel la sinjoroj de Pardubice.

La blazonon kun la duonĉevalo uzis jam la ĉefepiskopo Arnošt de Pardubice. Nuntempe ĝi estas blazono de urbo Pardubice. La aver-turon de Ješek en la milana pordego montras la reliefo en la antau-pordejo de la Verda pordego en Pardubice; la reliefon skulptis skulptisto B. Vlček laŭ bildo de Mikoláš Aleš.

/Laŭ F.K.Rosúlek kaj d-ro M.Mládek tradukis J.Patera/



KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

24-jara oficistino interesigas pri muziko, turismo kaj literaturo: Irena Ruszuk, str. Lenina 40/m 50, 17-200 HAJNÓWKA, Pollando.

27-jara bibliotekistino interesigas pri turismo, literaturo, belaj artoj kaj lingvistiko: Maria Strzegowska, str. Olszewskiego 1, PL-84-360 ŻEBŁA, Pollando.

21-jara nova esperantisto interesigas pri literaturo, muziko (rock), filmo kaj iom filozofio: Jarosław Sulski, str. Piaskowa 1/1, 86-300 GRUDZIĄDZ, Pollando.

21-jara studento interesigas pri lingvoj, turismo, literaturo kaj sporto, kolektas bildkartojn: Marko Listyg, str. Jęczmienna 25/15, PL-53-507 WROCLAW 2, Pollando.

29-jara instruistino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas postmarkojn: Justyna Babinska, str. Waryńskiego 35/5, 80-433 GDAŃSKO, Poll.

20-jara litova junulo deziras korespondi tutmonde pri E-movado, lingvoj, DX-ado, filatelo, muziko k.a.: Gintaras Žiaunys, Žemaitijos 9-25, SU-235500 MAŽEIKIAI, Litovio, Sovetunio.

Kun celo organizi esperantistan abstinenculan societon ni sercas esperantistojn, aktivajn batalantojn kontraŭ alkoholo kaj nikotinuado. Ni sercas seriozajn kontaktojn kun abstinenculaj organizaĵoj pere de Esperanto. Skribu al: Eugeno S. Perevertajlo, SU-700000

Poŝtamt ab/k 140, TAŜKENTO, Uzbekio, USSR.

Korespondantojn por infanĵoj el infangardeno, kiuj volas intersangi pentraĵojn, kaj por gelernantoj, kiuj volas korespondi, sed nur en la rusa lingvo, sercas esperantisto Gennadij Motĉev, SU-326866 NOVOKAIRY, Bereslavskij rajono, Ĥersonskaja obl., USSR.



33-jara diplomita flegisto volas korespondi kun esperantistino el Ĉeĥoslovakio. Liaj intereso: medicino, precipe psikiatrio kaj neurologio. Li satas danci, promeni en la naturo kaj ĝui la silenton en la naturo, vojaĝi per automobilo, iri al kinejo, legi interesajn librojn, naĝi, li satas la sunon. Lia adreso: Eugen KUTZ, Fachklinik "Fürstenhof" 3590 Bad Wildungen, B.R.D.



el viaj leteroj

Estimataj amikoj, karaj samideanoj, akceptu niajn plej korajn bondezirojn okaze de la Nova Jaro 1987! La Jubilea Jaro donu pluan puŝon al nia ĉiama propagando kaj agitado por la ideo de IL, por ESPERANTO! Senlace ni ŝenu, ĝin uzu, instru! Akceptu kaj komprenu nin la Homaro - la Homaro komprenu sin! Vivu Paco, Amikeco, Justeco! Nin regu bonkoreco kaj sincereco! Feliĉan Novan Jaron! Amike - esperantistoj

de Taskento

Mi revenis el Bohemia-Moravia Altaĵo, Horní Radlo, kaj mi trovis 1-6 ekzemplerojn de Starto de pasinta jaro. Mi nur fluge trarigardis ilin - kaj miaj haroj hirtigis. Kia teruraĵo tiu frazo: Nova kuraca domo PRO malsanoj de la moveblaj organaroj! Lau mi: Nova kuraca domo por malsanoj de la mov-organoj.

Aŭ: Li kantis princon - nu pardonu, sed denove stultaĵo.

Aŭ: "venko de la rekordo" do la rekordo venkis, ne la rekordo estis superita, transpasita.

Aŭ: "Preĝo sub la verda standardo far L. L. Zamenhof", do Zamenhof preĝis, li FARIS tion"

Vere unikaj esprimoj!!! Dr. Kamarýt plorus, kiel estas nun reprezentata la Skolo de Prago...
Milada Josková

Očekávali jsme s nedočkavostí další číslo Starta (4) a byli jsme zklamáni, že jsme v něm nenašli pokračování "Konversacio".

První tři lekce této konverzace jsme s nadšením přijali a využili v E-kroužku při výuce jak začátečníků, tak pokročilých. Tento metodický způsob probírané látky neměl dosud obdoby a velmi nám vyhovoval, že byl po jednotlivých lekcích a podle zájmových okruhů, takže i začátečníci jej uvítali a nebyli odrazení délkou článků. Každé téma je zpracováno komplexně a hlavně ve větách. Protože nová slova se ve větě lépe zapamatují. Někteří členové našeho kroužku by rádi viděli celý soubor vydaný tiskem, ale stačí nám, když bude pravidelně vycházet v každém čísle Starta. Zvláště proto, že nejsou učebnice ani slovníky. ... František Veselý, předseda EK Píseck

Dávám na vědomí, že ve mně vzbudilo silnou nelibost Starto č. 115 /č.4/86/, a to svým obsahem. Starto je svazovým věstníkem a má tedy zrodit hlavně děni ve hnutí a jeho stav. Tak tomu bylo v minulých letech. Znalost o stavu hnutí pomáhá i usměrňuje další činnost.

A jaký je obsah č. 4/86? Hnutí se věnují pouze 3,9 strany, neesperantským rubrikám, koničkům a recenzi zahraniční knížky se věnují 12,2 strany /1/ z celkového počtu 16 stran. ...
Jaroslav Mařík

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al presajo 30. 4. 1987. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310006395 ze dne 18.3.1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 30. 4. 1987. Dohlédací pošta Praha 07. Sniženy poplatky za poštovné povolen ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dotlačovací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979